

1975 januaro

68-a jaro

n-ro 829 (1)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando

1975
estu
bela!



Vi trovos

Se poŝtistoj en via lando diligentos, vi trovos, ke ĉi tiu numero de la revuo rekaptas la kutimajn aperdatojn, kiujn ni ekde nun klopodos "teni" kiel eble plej firme. Cetere, la streĉoj, kiujn la prizorgantoj de la revuo faris por eldoni ĉi tiun numeron ĝustatempe, estas nia maniero deziri kaj aŭguri fruktodonan jaron 1975.

Nu, tio ĉi estas la unua numero en la nova jaro kaj, kiel facile konstateblas, nia revuo denove ŝanĝas sian teknikan aspekton. Tiuj, kiuj skrupule legis niajn lastatempajn numerojn, povis rimarki, ke unu el la ĉefaj zorgoj de UEA en la nuna momento estas — kiel sanigi siajn financojn? Transirante al la kompostado sen rektigita dekstra margeno, ni ŝparas minimume duonon da kompostokostoj. Tamen, por iom kompensi la "perdon" de beleco, ni enkondukis tiom da interkolumnaj linioj, ke tio sufiĉe komplikis nian vivon, almenaŭ kiam temas pri enpaĝigaj laboroj. Ĉiukaze, ni estas survoje al bona teknika solvo ankaŭ tiurilate. Dum ni skribas ĉi tiujn liniojn, ankaŭ ni mem scivolas kiel aspektos la januara numero kiam ĝi revenos de la presisto. Eble kelkaj niaj teknikaj solvoj montriĝos sensukcesaj. Ankaŭ tiurilate "Iom da pacienco, mi petas!", kiel legeblas sur la apuda paĝo. Nia februara numero teknike sukcesos pli bone. Pretere, bonvolu noti, ke oni la nunan aspekton de nia revuo en la grafikaj rondoj nomas — la moderna aspekto!

Enhavo

- 1 Ŝanĝoj kaj ŝancoj: Iom da pacienco, mi petas! (Victor Sadler)
- 2 Atingoj en Kolombio: Membrigoj, kiuj montriĝis bona investo (sm)
- 3 Plurlingvismo en la praktiko: Internacie normigi saŭcojn
- 4 Reekzamenoj kaj konsideroj: Investoj en Esperanto (S. Osias)
- 5 Testamenti esperantaĵojn: La nekomprenemaj vidvinoj (Ulrich Lins), La kazo Tampey (Mark Starr)
- 6 Fondaĵoj: Prospero en Norwich, Grava enketo en Belgio: Politikistoj respondas pozitive
- 7 Ĉino pri la Movado en Ĉinio: La forgesita faktoro (W.Y. Ubeko)
- 8 La edukaj fenomenoj de turismo: Ĉiĉerono kiel edukisto (d-ro Tyburcjusz Tyblewski)
- 10 La Internacia Ekzameno: Batalkampoj serĉas heroojn (sm)
- 11 Hinda Unio: La unua lernolibro
Recenzoj ("Antaŭen al la laboro!", "Enkonduko en ĝeneralan biologion", "Premiitaj kaj aliaj noveloj", "Granda galerio Zamenhofa"), Kondiĉoj de recenzoj, Laste aperis...
- 14 TEJO-paĝo: La 31a Internacia Junulara Konferenco de TEJO: Al Fredericia, Kontakto la dika
- 15 Kongresa komunikado: Novaĵoj pri la 60a UK en Kopenhago
- 16 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 18 Esperanto en radio (kompleta tabelo)
- 19 Oficiala informilo
- 20 Anoncetoj kaj anoncoj

La kovrilo

La sereneco de la rideto, kiun ni donacas al vi sur la kovrila bildo, signifas bondezirojn niaflanke, ne nur por la jarŝanĝaj festotagoj, sed por la tuta jaro 1975. La foto de Jan Schönfeld el Ĉeĥoslovakio memorigu vin, ke oni en nia februara numero trovos detalojn pri la branĉo FOTOGRAFIO, en la kadro de la Belartaj Konkursoj 1975, en la 60a Universala Kongreso.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 8,25 gld.

Anonctarifo: 1p. 375 gld.; 1/2p. 200 gld.; 1/4p. 110 gld.; 1/8p. 65 gld.; 1/16p. 40 gld. Ripetrabato 20%

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro H.R. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne Pa. 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Racławicka 10m 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (08302) 7412.

Iom da pacienco, mi petas!

Ĉu la nova jaro, kiun ni eniras dum ĉi tiuj tagoj, estos efektive nova kaj novstila rilate la traktadon de la internaj movadaj problemoj, — tio dependas de ĉiu unuopa membro de UEA, de ĉiu unuopa konanto kaj/aŭ uzanto de la Internacia Lingvo, kaj nepre ne sole de la gvidorganoj de nia Asocio. Se vi ne konsentis pri nia emfazo de "generaciaj ŝanĝoj" kiel klarigo por la eventoj en Hamburgo, ĉu vi akceptus, ke ni parolu pri "generaciaj ŝancoj"? Eĉ se pravus tiuj, kiuj asertas, ke la novaj organoj de UEA, laŭ la aĝo de siaj membroj, ne estas pli junaj, oni malfacile neus, ke la homoj en tiuj organoj estas pli novaj. Kiel anstataŭo por tiuj, kiuj sidis en la gvidorganoj dum jaroj aŭ eĉ dum jardekoj, ankaŭ tiu nova teamo meritas havi sian ŝancon. Oni ĉiuokaze ne faru tro fruajn prijuĝojn kaj el ili fuŝajn konkludojn.

EN LA LASTAJ SEMAJNOJ atingis la Centran Oficejon en Rotterdam ankoraŭ kelkaj (3-4) leteroj de membroj, kiuj sciigas, ke ili ekŝiĝas el la membreco aŭ el delegiteco de UEA, en unu aŭ alia senco pro la ŝanĝoj en la konsisto de la Estraro kaj Komitato, okazintaj en la UK en Hamburgo.

Ĉiujare ĉirkaŭ mil individuaj membroj perdiĝas el niaj vicoj — ĉu definitive, ĉu nur provizore — kaj same ĉiujare ĉirkaŭ mil aliaj aliĝas aŭ realiĝas. Tiuj ŝanĝoj plejparte havas financajn kialojn aŭ respegulas mallongdaŭran interesiĝon pri la Movado. Komparo kun aliaj similaj organizaĵoj montras, ke tio ne estas speciala karakterizo de Esperanto-asocioj. Sed ekŝiĝoj pro principaj kialoj estas malpli oftaj, kaj tial valoras foje ekzameni, kian sencon aŭ kian efikon ili havas.

Unue ni rigardu la kaŭzojn de la ekŝiĝoj. Se oni devus juĝi nur laŭ la ekŝiĝleteroj mem, oni ne ekscius multon konkretan. Vortoj kiel "hontindaj eventoj", "marionetoj", "palaca revolucio" kaj "ekleziaj agoj" esprimas evidente fortajn sentojn, sed ili ne estas tre specifaj. Atingis nin tamen ankaŭ diversaj cirkuleroj kaj artikoloj, kun enhavo almenaŭiom pli specifa,

kiuj, rekte aŭ nerekte, instigas al ekŝiĝo. Ĉar ili povis esti la kaŭzo de la jam okazintaj ekŝiĝoj aŭ povus esti kaŭzo de estontaj ekŝiĝoj, necesas iom analizi ilin.

La ĉefa konstato, kiu altrudas sin, estas, ke inter la verkintoj regas kredo, ke UEA ne plu estas politike neŭtrala organizaĵo, aŭ almenaŭ timo, ke ĝi povus en la estonteco forlasi la politikan neŭtralecon. La plimulto de membroj de UEA, kiuj juĝas la Asocion laŭ ĝia revuo, laŭ ĝiaj kongresoj kaj laŭ ĝiaj ceteraj efektivaj agadoj, verŝajne perpleksiĝas, demandante sin, en kio konsistas tiu neneŭtraliĝo.

Unu gazeto citas kiel ekzemplon la decidon de la nova Estraro, fari apartajn klopodojn por altigi la nombron de abonantoj de *Esperanto* en orienteŭropaj landoj. Nu, estas samtempe preparata abonkampanjo ĉe usonaj universitataj bibliotekoj kaj ĵus atingita interkonsento pri 300 pliaj abonoj en Belgio. Kie ajn estas merkato por abonoj, tie UEA klopodos varbi. La sama gazeto informas, ke la nova Estraro decidis, ke "tiu organo estos malfermita al diverseco de **ideologioj**". Efektive, la decido tekstas: "La revuo estu malfermita al diverseco de **opinioj** kaj respegulu la interesojn de la aktiva esperantistaro". (Niaj dikigoj.)

Alia fonto de la timoj pri neneŭtraliĝo de UEA estas mem la antaŭa prezidanto de UEA, kiu alarmis la membraron pri tio en sia aprila ĉefartikolo "UEA en danĝero de malintegriĝo". En alia artikolo prof. Lapenna skribis, ke li "eksciis el pluraj fidindaj fontoj", ke la gvidantoj de 4 landaj asocioj, "helpataj de pluraj estraranoj kaj estintaj membroj de TEJO, sekrete planas novan atencon kontraŭ la neŭtralecon, ĉi-foje rekte kontraŭ la neŭtralecon de UEA mem". Lia ĉefa argumento por tiu aserto turniĝas ĉirkaŭ la kredo, ke la kampanjo, kiu celis anstataŭigi lin kiel prezidanton de la Asocio, estis kampanjo por forigi lin kiel "bastionon de neŭtraleco". Li skribis: "... la kampanjo kontraŭ la neŭtralecon estis kaj verŝajne plu estos nedisigeble ligita al hontindaj atakoj, inkluzive sendadon de krimaj anonimaj telegramoj, kontraŭ min persone".

Estas klare, ke maljustaj atakoj kaj insultaj telegramoj estas kondamnendaj. (Cetere, tiaj telegramoj estis adresitaj ankaŭ al la subskribinto de ĉi tiu artikolo). Ne estas klare, ke ili prezentas atakon kontraŭ la neŭtraleco. En Hamburgo estis klare, ke la granda plimulto de la Komitato deziras elekti novan prezidanton. Estas same klare, ke por multaj el la voĉdonintoj tiu ŝanĝo tute ne estis ligita al la demando pri neŭtraleco, kaj ne estas klare, por kiom el la voĉdonintoj ĝi eventuale ja estis ligita al tiu demando.

La nova prezidanto de UEA, la Estraro, la Komitato kaj la tuta Kongreso en Hamburgo rekonfirmis la principon de neŭtraleco kiel "la sola ebla vojo por la prosperigo de la Asocio, grava unuiga forto por ĝia laboro, kaj plej bona kondiĉo por efika kaj harmonia internacia kunlaboro en la kadro de la Asocio". Estas la devo de ĉiuj ofic-havantoj kaj de ĉiuj

ordinaraj membroj de UEA solidare apogi tiun linion kaj, se necese, kunagi por defendi la Asocion kontraŭ ĉiu ajn atenco al la neŭtraleco, de kiu ajn flanko ĝi povus veni. Kontraŭe, misprezenti la decidojn de la Estraro aŭ senbaze atribui al ĝi politikan tendencon ne estas defendo de neŭtraleco sed estas rekta subfoso de la unueco de UEA kaj estas en si mem neneŭtrala agado. Cetere, se efektive la neŭtraleco estus forlasita — kaj la ofico de direktoro de la C.O. permesas tion sufiĉe bone prijuĝi — ankaŭ mi reekzamenus mian ligitecon al UEA.

Tiom pri neŭtraleco. Inter la eksigintoj troviĝas ankaŭ iuj, kiuj eksigis ne pro tiaj timoj sed pro malŝato al unu aŭ alia el la novaj estraranoj. Tiaj eksigoj venadis tra la jaroj ankaŭ antaŭ Hamburgo, de membroj, kiuj konfliktis, ĉu persone, ĉu ideo, kun prof. Lapenna aŭ alia antaŭa estrarano. Se temis pri malsameco de opinioj, tiam mi kiel direktoro de la Centra Oficejo ĉiam respondis, ke eksigo estas la malplej efika maniero prezenti sian starpunkton. Eksigi el UEA pro tio, ke oni ne samopinias kun ĝiaj gvidantoj, signifas simple: cedi. Se ĉiuj, kiuj havas unu opinion, forlasas la debaton, tiam aŭtomate devas venki la alia(j) opinio(j) pro manko de kontraŭ-

staro. Tial mi hodiaŭ same respondas al tiuj, kiuj pro sinceraj malkonsentoj eksigis: Se sur la unuan lokon vi metas la interesojn de la Esperanto-movado, tiam prefere restu kaj esprimu vian opozicion en la kadro de UEA kaj de ĝiaj Statuto kaj Regularoj. Ĉiu membro rajtas forlasi la Asocion, same kiel ĉiu civitano devus havi la rajton forlasi sian landon; sed ĉu ne estas ofte pli kuraĝa tiu, kiu restas kaj mal-samopinias?

Cetere, eksigi estas privilegio donita nur al tiuj, kiuj sukcesis pagi membrotizon ... Por multaj, ankoraŭ la aliĝo al UEA estas nura revo. En nia novembra ĉefartikolo ni faris fortan alvokon "Praktiki solidarecon" per donacoj al la Fondaĵo Canuto, el kiu eblas membrigi almenaŭ parton de tiuj, kiuj alimaniere ne povas kotizi. La rezulta alfluo de donacoj jam superis la esperojn, kaj ankoraŭ alvenadas kontribuoj. Ke tiom da homoj ne nur ne venas al la ideo eksigi sed male ofertas siajn monrimedojn por ebligi al aliaj la membrigon, tio metas en belan perspektivon la kelkajn malkuraĝigajn leterojn, al kiuj ni dediĉis la komencon de ĉi tiu artikolo. Dankon pro la solidareco!

V. Sadler

ATINGOJ EN KOLOMBIO:

Membrigoj estis bona investo

KIEL VI VERŝAJNE KONSTATIS en nia decembra numero (p. 203-205), la novaj gvidorganoj de UEA dediĉas apartan atenton al la landoj kaj kontinentoj en kiuj la Esperanto-movado ankoraŭ ne gajnis firman grundon. Tiurilate, kiel aparta kazo montriĝas la movada situacio en Sud-Ameriko, kie oni renkontas landojn kun relative forta Movado, sed ankaŭ landojn en kiuj organizita laboro por la Internacia Lingvo aŭ vegetas aŭ tute ne ekzistas.

Kiam temas pri Kolombio, malfacilas ĝin klasifi en kiun ajn el la menciitaj kategorioj, — ĝi estas kazo por si mem, feliĉe — bona kaj imitinda kazo. Se vi volus iom fosi tra la antaŭaj numeroj de nia revuo, en la julia/aŭgusta numero de la pasinta jaro (p.138) vi trovus indikon, ke en la fino de la jaro 1973, la lando pri kiu ĉi tie temas havis entute 9 individuajn, kaj eĉ ne unu asocian membron de UEA, ĉar, cetere, landa Esperanto-organizaĵo en Kolombio tute ne ekzistas. Tamen, la Movado en Kolombio lastatempe notis atingojn, pri kiuj povus fieri eĉ landoj kun fortaj landaj organizoj. Jen, bonvolu juĝi mem:

"Malgraŭ mia silento dum tiom longa tempo, ni ja daŭrigas la varbadon de novaj esperantistoj kaj la

instruadon de Esperanto ĉi tie en Bucaramanga. Mi ĵus komencis gvidi korespondan kurson...Ĉi-momente, 215 personoj studas laŭ ĉi tiu kurso". Tiel skribis al la Centra Oficejo, meze de la pasinta jaro, s-ro L.J. Santos Morales, kiu depost 1969 unue estis kvar jarojn membro de UEA pere de la Fondaĵo Canuto, kaj dum la lastaj du jaroj iel mem sukcesis transpagi sian kotizon de Membro-Abonanto.

Fine de oktobro 1974, s-ro Manuel Angel, estro de la Lingva Fakto en Universidad Pontificia Bolivariana, en la urbo Medellín, en unu el siaj oftaj leteroj skribis ankaŭ jenon: "La Ĵurnalisma Fakultato de nia Universitato (dekmilo da gestudentoj) decidis, laŭ mia sugesto, ke gelernantoj devas elekti elinter kvar fremdaj lingvoj: la angla, la itala, la franca kaj Esperanto..... Ĝis nun la gestudentoj estis ekzamenataj nur en la angla. Sed ekde 1975, mi instruos Esperanton kiel regulan studobjekton por la licenciaj kursoj." La leteron de s-ro Angel akompanis kopio de tiurilata decido de la fakultata dekanato.

Valoras mencii, ke ankaŭ s-ro Angel, en la jaro 1972, estis membrigita en UEA el la Fondaĵo Canuto, sed por la jaro 1975 li jam trovis propran vojon pagi sian MA-kotizon. Ambaŭ kolombiaj aktivuloj, s-roj Santos Morales kaj Manuel Angel, estas inter la plej fervoraj klientoj de la Libroservo de UEA, kaj, kiam ajn tio eblis, kiam ajn la Propaganda Konto havis iom da mono, la du kolombiaj aktivuloj ricevadis helpon ankaŭ el tiu fonto. Montriĝis, ke tiu helpo ne estis vana kaj, ke ĝi en la kazo de Kolombio estis bona kaj valora investo en la tutmondan disvastiĝon de la Internacia Lingvo.

Internacie normigi saŭcojn

En la Eŭropa Ekonomia Komunajo oni ekde ĝia fondiĝo neniam aparte atentis la problemojn, kiujn en la sferon de la internacia kunlaboro alportas la lingva diverseco. Lastatempe oni ĉiam pli ofte mencias krizon de EEK. Kvankam la nesolvita lingva demando ne estas la ĉefa kaŭzo de tiu krizo, estas ekster ĉia dubo, ke ankaŭ la lingva diverseco kaj praktika malegaleco aldonas siaspecan spicon al la kriza kuko.

LA EŬROPA EKONOMIA KOMUNAJO (EEK) estiĝis kun la klara celo krei unuecon kaj pli intiman kunlaboron inter la ŝtatoj apartenantaj al ĝi. Nur pri lingva unueco neniam estis parolo. Eble la nacia fiero malpermesis almenaŭ al la pli grandaj ŝtatoj eĉ ludeti per la ideo, ke iliaj respektivaj naciaj lingvoj povus ne sufiĉi por internacia komunikado. Eble tro influan rolon en la preparaj stadioj ludis profesiaj poliglotoj, kiuj efektive elturniĝas sen gravaj ĝenoj en plurlingva medio. Eble oni ĝenerale kredis, ke la solvoj aplikataj ĉe UN montriĝos taŭgaj ankaŭ en EEK, ke ĉefe gravas la nova spirito de kunlaboro, kiu iom post iom de si mem forbalaos tiajn bagatelajn praktikajn obstaklojn, kia estas la lingva.

Hodiaŭ foje ŝajnas, ke okazas ĝuste la malo: ke ĝuste la diskutegoj pri relative neinspiraj temoj, kiel ekzemple la internacia normigo de saŭcoj, minacas subfosi la pli noblajn kaj larĝajn konceptojn pri unueco — kaj ke tro ofte la "bagatela" lingva problemo forbalaas la spiriton de kunlaboro.


Usona ĵurnalisto George Taber, kiu oficis dum du jaroj kiel gazetara reprezentanto de la Komisiono de la Eŭropaj Komunajoj, komentis laste en *Time* pri tri aspektoj de tiu degenero el idealismo ĝis grotesko.

Se plurlingvismo ŝajnis ankoraŭ iel praktikebla, kiam siatempe temis en EEK pri kvar laboraj lingvoj, tiam nun necesas revizii tiun opinion, kiam temas jam pri ses tute egalrajtaj lingvoj. Principe, absolute ĉiuj dokumentoj — eĉ simpla mendo de krajonoj — devas estis tradukitaj en la ses lingvojn. Ne mirinde, ke la ĉefoficejo de EEK en Bruselo produktas eksterproporcian kvanton da paperajoj.

Al la rapide kreskanta burokrata ĵargono, kiu invadas tiel la dokumentaron kiel ankaŭ la diskutojn, aldonas plian babelan spicon la sovaĝa miksado de lingvoj, aŭdebla ĉe oficistoj de EEK. En neformalaj kunvenoj okazas ne malofte, ke unuopaj parolantoj nekonscie glitas el unu lingvo en alian — kaj ankoraŭ alian, aŭ reen, ne konsiderante, ĉu la aŭskultantoj kapablas tion sekvi aŭ ne. Neformalaj skribaj komunikaĵoj — tiel raportas Taber — havas tian sublime ĥaosan gramatikon, kian povas atingi nur nederlandano, italo kaj anglo, kiuj kune pridisputas la formuladon de teksto en la franca. . .

Eble la plej trista lingva fenomeno, tamen, el vidpunkto de la ideoj de egaleco kaj internaciismo, estas la formiĝo de neoficialaj, naciaj komunik-linioj interne de la ĉefoficejo. Ekzemple, se iu oficisto en unu fako bezonas informojn el alia fako, li malofte venas al la ideo peti ilin tra la oficialaj kanaloj. Prefere li turnas sin al iu sia samnaciono, kiu tuj komprenos, kion li bezonas, kaj povos havigi al li la informojn sen tradukado kaj prokrastoj. Tiel cementiĝas la aparteco kaj plifortiĝas la malsamaj laborstiloj de la diversaj naciaj grupoj inter la oficistaro.

La arĥitektoj de EEK ŝajne pretervidis unu esencan konstrudetalon: Vane oni kovas en si spiriton de internacia solidareco, se oni ne kapablas almenaŭ per vortoj komuniki ĝin unu al la alia.



Bruselo, la ĉefurbo de la Eŭropa Ekonomia Komunajo: Ĉu la ĉielo super EEK havas esperigajn stelojn?

Investoj en Esperanto

Ni ne povas prezenti al vi la aŭtoron de ĉi tiu teksto, ĉar ankaŭ ni malmulton scias pri li. Jam antaŭ amaso da monatoj ni eĉ formetis en nian arkivon la tekston de s-ro Osias el Bukareŝto. Ni revenis al la teksto pro propraj konsciencrimorsoj kaj — post drasta koncizigo — jen nur fragmento de la origina teksto, fragmento pripensinda.

LA HOMARO marŝas certe al historie necesa tutmonda integriĝo. La komenciĝinta internacia ekonomia integriĝo disvolviĝas ĉiam pli rapide. Ĝin sekvas granda batalo por politika integriĝo. Grava flanko de la movo al ĝenerala integriĝo estas la movo por la monda lingva integriĝo, por la ĝenerala enkonduko de la Internacia Lingvo.

Ĉiuj ĝisnunaj atingoj de Esperanto estas rezulto de grandega homa laboro de esperantistoj kaj de multaj aliaj. La unua investinto de laboro estis Zamenhof mem, kaj la unua moninvestinto estis lia bopatro. Simile al Zamenhof, la unuaj esperantistoj en diversaj landoj, kiuj akceptis la proponon por internacia lingvo, same oferis multon el sia laborpovo. Ili lernis la lingvon kaj komencis kontribui al ĝia vivo, al ĝia disvolvo kaj disvastigo. Simile al Zamenhof, ili investis en Esperanto krom sia propra laboro ankaŭ monon. Sen la investoj de laboro kaj mono fare de la unuaj esperantistoj ne povus esti la Esperanto-movado kiel internacia socia fenomeno.

Dum preskaŭ jarcento, Esperanto pruviĝis ne profitdona al investintoj de mono, nek salajrodona al la laborintoj por ĝi. La esperantistoj estis neriĉaj homoj, kiuj por vivi devis profesie labori en diversaj aliaj laborkampoj ol Esperanto. Jen grava kialo, pro kiu Esperanto disvastiĝis ĝis nun tiel malrapide.

Estiĝis tiel ia stagna stato. La granda kapitalo ne estis investita en Esperanto, ĉar la malrapide kreskanta nombro de esperantistoj ne ebligis profiton, kaj la nombro de esperantistoj kreskis malrapide ĝuste pro tio, ke la senprofitaj investoj en Esperanto estis tre malgrandaj. Ĉi tie temas pri esperantistoj kiel aĉetantoj de esperantaĵoj, pri esperantistoj, kiuj estas interesitaj bone lerni la Internacian Lingvon por ĝin efike utiligi.

Por la amasoj, por la granda plimulto de la homoj, la materia intereso estas la decida faktoro, kiu igas ilin peni, labori, konsumi tempon en kiu ajn difinita direkto. Ĝis nun Esperanto ankoraŭ ne estis lernata de homoj puŝataj de la materia intereso. Kvankam

Esperanto estas multoble pli facile lernebla, ol ĉiu ajn alia lingvo, la vivo montras al ni, ke multe pli da homoj montras intereson por lerni diversajn naciajn lingvojn, elspezante por tio multege da mono, tempo kaj peno. Malantaŭ tiu intereso troviĝas precipe du motivoj.

La unua estas la ebleco, kiun donas kelkaj lingvoj sed Esperanto ankoraŭ ne, ricevi pli facile laboron kaj pli bonan salajron. Kvankam la ĝenerala enkonduko de Esperanto alportos al la homaro grandegan ŝparon de laboro, kio el ekonomia vidpunkto ebligos saltegon en la disvolviĝo de produktaj fortoj, kaj el socipolitika vidpunkto signifos evidentan paŝegon antaŭen, ĝis nun la nombro de profesiaj, salajritaj esperantistoj estas absolute sensignifa.

La dua motivo estas la ebleco, kiun al diversaj fakuloj donas kelkaj lingvoj — sed Esperanto ankoraŭ ne —, ricevi sciencajn, teknikajn, artajn, sportajn aŭ aliajn specialajn informojn bezonatajn. La ĉiam kreskanta necesego de internacia lingvo estas senpere ligita kun la nuntempa eksplodo de informoj kaŭzita de la scienc-teknika revolucio kaj de la intensiĝo de ĉiufankaj internaciaj rilatoj.

La idealoplenaj aktivaj esperantistoj, kiuj pasie batalas por la ĝenerala enkonduko de Esperanto, kutime ne amas tiujn, kiuj ne estas similaj al ili. La amasoj ne emas esti oferemaj pioniroj, ili ne lernos la Internacian Lingvon puŝate nur de la entuziasmo, kiun estigas nia nobla idealo. La malfruiginta eksplodo de Esperanto okazos certe tiam, kiam la homoj komencos lerni la Internacian Lingvon tial, kial ili lernas fremdajn naciajn lingvojn. Kaj por tio la nura nepagita, amatora laboro de kelkaj esperantistoj, la malgrandaj investoj ĝisnunaj, tute ne estas sufiĉaj. Por tio estas necese profesie laborigi multajn unuarangajn specialistojn, kiuj ricevu rekompence salajron aŭ alian pagon. Por tio estas necesaj pli grandaj investoj en Esperanto, kiuj ebligos, ke la oferto de faka esperantlingva informado antaŭeniru kaj stimulu la kreskon de la nombro de lernintoj de la Internacia Lingvo.

La Esperanto-movado devus esplori, el ekonomia vidpunkto, la plej taŭgan sinsekvon de la movadaj investoj. Ni devas forlasi la investojn, kiuj nur tre malrapide kreskigos la nombron de tiuj, kiuj serioze lernos la lingvon kaj fariĝos aĉetantoj de esperantaĵoj. Ni devas antaŭe investi tie, kie ni povas kreskigi rapide la nombron de esperantistoj.

Ekzemple, se temas pri la demando de prioritato inter la du grandaj kampoj de la homa interkomunikado — la beletro kaj la scienco — la elekto devus esti facila. Ne troviĝos multaj homoj, kiuj speciale lernos la Internacian Lingvon por povi legi originalajn beletrajn verkojn, kiujn ili povas legi nur en Esperanta revuo. Sed, kiam regule aperos esperantlingva revuo, kiu enhavos plenan, plej novan informaron pri iu scienca fako, eĉ se nur tradukaĵoj el diversaj fremdaj lingvoj, troviĝos malmultaj fakaj scienculoj, kiuj rezistos al la tento lerni la Internacian Lingvon.

S. Osias

La nekomprenemaj vidvinoj

“LA FAKTO, ke kelkaj riĉaj Esperanto-kolektoj ĉi-jare intence estis forbruligitaj de nekomprenemaj vidvinoj (jes, vere!), nin forte dolorigas ...”

Kun spirhalto ni legis tiun ĉi tristan informon antaŭ nelonge en *der esperantist*, la organo de la Esperanto-movado en GDR. Kaj kredeble multaj esperantistoj povus rakonti pri similaj korŝiraj okazaĵoj: multjara entuziasma adepto de Esperanto subite forpasis, kaj kiam, post deca atendado diktata per konsideroj de pietato, liaj Esperantaj amikoj interesiĝis pri la estonta utiligo de lia biblioteko, ili konsternite eksciis, ke la vidvino aŭ gefiloj jam fordonis al rubejo aŭ brokantejo la supozatan fatrason, kiu envere estis la frukto de dum jaroj ame entreprenata kolektado. Sed ni ne kulpigu la vidvinojn pro “barbara ago”, se post la morto de la edzo, eble sub malboniĝintaj vivkondiĉoj, ili emas kiel eble plej baldaŭ liberiĝi de havaĵo, kiun ili ne scias utiligi kaj kies valoron ili ne konscias. Ofte ankaŭ ne troveblas en la proksimeco esperantistoj, kiuj povus ĝin transpreni aŭ konsili kion fari kun ĝi.

Sed ekzistas eliro: La posedantoj de kolektoj de Esperantaj libroj kaj gazetoj povas asekuri sin kontraŭ nerevokebla perdo kaj anticipe eviti la malbonon, ke post ilia morto neniigu trezoroj. Ili povas, ekzemple, deklari en sia testamento, ke la tuta priesperanta postlasaĵo estu transdonita al la Biblioteko Hodler. Tiu ĉi jam nun rangas inter la plej grandaj kaj valoraj kolektoj de Esperanta literaturo en la mondo, kaj ĝi troviĝas en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam, kie ĝin uzis kaj daŭre uzas ne nur esperantistoj, sed ankaŭ aliaj personoj, kiuj por sciencaj celoj devas

konsulti tiun oran minejon de libroj, periodaĵoj kaj dokumentoj. Neniu alia Esperanta biblioteko, krom ĝuste la biblioteko Hodler, liveras al petantoj tiel rapide, kvalite kaj malmultekoste fotokopiojn de siaj havaĵoj.

Kvankam jam nun tie estas ĉ. 10 000 volumoj, ankoraŭ mankas multaj malnovaj, raraj materialoj el la pasintaj jardekoj, ekde la frutempo de Esperanto, kaj des pli la mondlingva literaturo el la antaŭ-zamenhofa epoko. Estas facile imageble, ke dise tra la mondo troviĝas ĝuste tiuj valoraj, kiuj mankas al la Biblioteko Hodler. Kaj sendube la posedantoj deziras, ke iam, post ilia forpaso, ili estu deponitaj en sekura loko, kie oni povos ilin facile uzi. Kial do ne testamenti ilin al la Biblioteko Hodler aŭ eĉ jam nun informiĝi ĉe ĝi (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando), ĉu ne per tiu aŭ alia volumo eblas ŝtopi dolore sentatan truon en la Biblioteko?

Kunhelpu, ke la Biblioteko Hodler iĝu la centra arkivo de la Esperanto-movado. La postaj generacioj nemezureble dankos vian antaŭzorgemon, kaj neniu plendos pri la malzorgo de vidvinoj. U. Lins

La kazo Tampey

VETERANA Esperantista Klubo (VEK), faka asocio aliĝinta al UEA, traktis en sia kunsido en Hamburgo la fenomenon, ke diversaj esperantaĵoj inkluzive de valoraj leteroj damaĝe malaperadas okaze de la forpaso de la posedanto.

Okazis al mi la jena sperto. En aŭgusto 1974 mi ricevis telefonvokon ekzameni la restaĵojn de d-ro Max Tampey, mia najbaro ĵus forpasinta. Lia bofilo jam decidis forĵeti liajn paperojn kiel rubon. Ekzameninte mi trovis, ke Tampey, krom esti okulisto, estis ankaŭ frutempa adepto de la Internacia Lingvo kaj eĉ verkis lernolibron pri Esperanto. Poste li sekvis Beaufront'n kaj verkis lernolibron pri Ido; fine li penis verki sian propran lingvon Gloro!

Forgesi testamenti dokumentojn endanĝerigas nian Movadon kaj ĝian historion. Ekzistas diversaj instancoj de nia Movado, kiuj pretas ricevi kaj prizorgi ilin, ekz. UEA-Biblioteko, Internacia Muzeo en Vieno kaj eĉ lokaj societoj.

Ĉiuj pioniroj en kaj ekster VEK flegu la kompletecon de nia historio per testamento pri siaj valoraj dokumentoj. Mark Starr



La Biblioteko Hector Hodler en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam: Trezorejo de la Movado.

Prospero en Norwich

DUM LA TUTA MOVADO, samkiel la cetera mondo, spertas gravan finan kan krizon, almenaŭ unu el la multnombraj movadaj fondaĵoj ŝajnas prosperi. Temas pri la brita Noriĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo, kiun en la jaro 1966 iniciatis kaj starigis s-ro E.F. Dean, unu el la plej konataj mecenatoj de la brita kaj internacia Movado. La celo de la Fondaĵo estas progresigi la edukadon por internacia kompreniĝo, kion al la Fondaĵo rekonis ankaŭ ekstermovadaj instancoj. En la fino de junio 1974, la Fondaĵo disponis pri pli ol 8 000 britaj pundoj (ĉ. 50 000 gld.), kio estas atentinda kapitalo, kies renton oni uzas por subvencii vojaĝojn de junaj esperantistoj kaj por stimuli esplorojn pri instrumentadoj de la Internacia Lingvo. Ĉar laŭ sia aktiveco la Fondaĵo ne restas en la limoj de Britio, ankaŭ ĝia kapitalo meritas internacian subtenon.



S-ro E.F. Dean, mecenato de la Movado: Noriĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo aljuĝas ankaŭ jaran literaturan premion en la valoro de 200 britaj pundoj (versajne la plej granda monpremio en la Movado) al junaj verkistoj, kiuj atingas elstare altan nivelon en siaj verkoj.

GRAVA ENKETO EN BELGIO:

Politikistoj respondas pozitive

LA BELGA MOVADO lastatempe montriĝas sufiĉe vigla kaj entreprenema, kelkfoje preta aŭdace liberiĝi eĉ de flegindaj tradiciaĵoj, kiujn la sorto en la nuna momento ne favoras. Unu el tiaj kuraĝaj paŝoj de la Belga Esperanto-Federacio estis la decido, ke la landa organo de BEF, *Sonorilo*, post 66 jaroj da ekzistado ĉesu aperadi kaj, ke la membroj de BEF kolektive abonu nian revuon. Kiel nun statas la aferoj, tio ŝajnas esti realeca kaj prudenta decido, kiun ni vidas ne sole kiel rekonon al nia revuo, sed ankaŭ kiel siaspecan defion al la revuo *Esperanto*, kiu devas konservi aŭ altigi sian nunan kvaliton, se ĝi ne volas fine de ĉi tiu jaro perdi la kolektivitan abondon de BEF. Tamen, la kolektiva abono (v. ankaŭ nian decembran numeron, p. 202) ne plu estas la plej freŝa inter la gravaj novaĵoj el Belgio. En la januara/februara numero de la nacilingva eldonaĵo de BEF *Esperanto Panorama*, ni legis raporton pri intensa kaj ampleksa parlamenta agado de BEF. Jen detaloj:

Fine de novembro 1974, la sekretariato de BEF dissendis entute 389 leterojn, kiuj iris al la adresoj de

ĉiuj belgaj deputitoj, ĉiuj senatanoj kaj ĉiuj ministroj de la belga registaro. Tiu leteraro efektive estis unu el la plej grandaj enketoj pri la sinteno de la politikistoj al la Internacia Lingvo, iam entreprenitaj en Belgio. Ĝis la 1-a de decembro 1974, alvenis entute 60 respondoj, el kio 40 de nederlandlingvaj, kaj 20 de franclingvaj politikistoj, t.e. 40 de flandroj, kaj 20 de valonoj. Statistike oni prilaboris nur la flandrajn respondojn kaj venis al interesaj konkludoj:

El 40 respondintoj, al la unua demando de la enketo: "Ĉu vi opinias, ke unu lingvo kiel internacia kaj komuna interkomprenilo estus utila en Eŭropo?", ĉiuj 40 enketitoj respondis jese! Al la dua demando: "Ĉu vi opinias, ke nacia lingvo povas roli kiel internacia interkomprenilo, aŭ ne?", 12 politikistoj respondis jese, 24 nee, kaj unu ne diris sian opinion. La tria demando rilatis rekte Esperanton kaj tekstis: "Ĉu Esperanto estas konsiderinda por la plenumo de la rolo de internacia lingvo?". La respondoj estis: 21 jes, 13 ne, kaj 3 sen opinio. La lasta demando en la enketaj leteroj estis: "Ĉu vi volas morale apogi la Esperanto-movadon kaj ĉu vi apogus parlamentan iniciaton por disvastigo de Esperanto?". Tiu demando rikoltis 25 jesojn, 3 neojn, kaj 9 nerespondojn.

En la sekretariato de BEF oni certe atendis pliajn respondojn ĝis la fino de la jaro 1974. Tamen, oni tie ne emis kaŝi sian kontenton pri la rezulto, kiun donis la analizo de la unuaj reagoj al la enketo. Ankaŭ en la kazo de ĉi tiu enketo, kies demandoj (inkluzive de ilia sinsekvo) estis sagace kunmetitaj, montriĝas tute klare, ke la movadaj problemoj ne fontas el ia ekstera ignoro, sed el la mankoj de la Movado mem.

La forgesita faktoro

Kun precize unujara prokrasto, ni aperigas ĉi tiun reagon al la artikolo de s-ro Kurisu kei pri la nuna stato de la Esperanto-movado en Ĉinio. La asertoj de s-ro Ubeko ne nepre estas ankaŭ starpunkto de nia redakcio, samkiel tio ne estis la opinioj de s-ro Kurisu. Se ni tamen aperigas ĉi tiun reagon, tio signifas, ke ni aliĝas al la opinio de s-ro Ubeko, ke eksterlandanoj traktantaj ĉinajn temojn, pro nekono, ofte emas preteratenti kelkajn simplajn, sed gravajn faktojn.

DUM LA LASTAJ JAROJ, en iuj Esperanto-gazetoj aperis artikoloj, kiuj kritikis la Esperanto-movadon en Ĉinio. En la brita gazeto *The Worker Esperantist*, s-ro R. Banssett (versajne kimro kaj SAT-ano), en sia letero, publikigita en la septembra numero de 1969, iom kritikis, laŭ li, tede propagandan karakteron de *El Popola Ĉinio*. La sama aŭtoro publikigis en la junia numero de 1970, en la sama gazeto, alian leteron, kiu parolas pri "infana sinteno" de ĉinaj esperantistoj. Lastatempe, s-ro Kurisu kei, japana esperantisto, publikigis longan artikolon en la revuo *Esperanto* (januaro 1974, p. 6-9), kie li traktis la Esperanto-movadon en mia lando.

Mi estas simpla ĉina kamparano, esperantisto. Mi ne estas partiano, nek mi membras en la Ĉina Esperanto-Ligo. Tamen, mi sentas kvazaŭ devon reagi al la menciitaj artikoloj, kvankam mia vidkampo estas tre malvasta kaj mia opinio ne nepre grava. Ĉar mi estas neoficialulo kaj esprimas ian bazetaĝan opinion, mi esperas, ke miaj starpunktoj proksimas al la vera fizionomio de iuj aferoj.

Ĉiuj scias, ke laŭ sia karaktero la lingvo estas nur ilo. Esperanto estas lingvo, do ankaŭ ĝi estas ilo. Kiu uzas la ilojn, al tiu ili servas. Nia gazeto propagandas niajn grandajn atingojn al la popoloj en eksterlando. Ĉar Esperanto estas internacia helpa lingvo, ĝi do estas la plej bona ilo por internacia propagando. Ekzistas esperantistoj, kiuj lernas la lingvon nur por si mem, por interŝanĝado de poŝtmarkoj, bildkartoj, libroj k.s. Kial nia ŝtato ne povas uzi la lingvon kiel ilon por internacia propagando? Ŝajnas, ke multaj homoj miskomprenas la vorton propagando, asertante, ke ĝi egalas al mensogo. Tio probable baziĝas sur iliaj travivaĵoj, sed tio tamen estas alia afero.

Aliflanke, homoj, kiuj neniam mem estis en Ĉinio, pretas nur laŭ onidiroj kaj laŭ siaj subjektivaj suspektoj aserti, ke la Esperanto-movado en nia lando ne estas libera kaj sendependa. Do, lasu kelkajn miajn vortojn temi pri tio.

Nuntempe en nia lando ne ekzistas publikaj kursoj por instrui Esperanton, tio ja estas vero. Tamen, oni ne povas laŭ tio konkludi, ke en Ĉinio ne ekzistas ebleco de libera lernado de Esperanto. Depost la Granda Proleta Kultura Revolucio en nia lando,

multaj kulturaj fakoj provizore ĉesigis sian funkciadon. Tia dumtempa ĉesigo tute ne signifas, ke ni volas por ĉiam ĉesigi nian enlandan Esperanto-movadon. Male, provizora ĉesigo celas ĝuste pli bonan rekomencon post la reordigo de nia organizo. Dum la ĉesiga tempo neniue bremsis la lernadon kaj propagandadon de Esperanto. Same, neniue baris nian internacian korespondadon. Ekzemple, dum la lastaj jaroj, mi ĉiam libere korespondis kun amikoj en Japanio, Vjetnamio, Koreo, Hungario kaj Germana DR. Mi ricevis multajn librojn kaj gazetojn el diversaj landoj. Ĉu oni povas aserti, ke tio estas manko de libero kaj sendependeco? Dum longa tempo s-ro Kurisu (mi cetere korespondas ankaŭ kun li) aktivis en la laborista movado de Japanio kaj estis trifoje malliberigita. Li do bone scias, kio estas libero kaj kio estas persekuto. De kie li informiĝis, ke en mia lando la Esperantaj lernantoj estas elektitaj kaj selektitaj? Mi ion tian neniam aŭdis. Mi absolute ne neas, ke la Esperanto-movado en Ĉinio nuntempe troviĝas en etapo de malalta tajdo, kio tamen ne signifas, ke niaj aŭtoritatoj iam persekutis la Movadon kaj nin ĉinajn esperantistojn. Hodiaŭ, ni ĉinoj estas ankoraŭ tre malriĉaj, ni ĉinaj kamparanoj des pli. Kompare kun la eksterlandaj esperantistoj, ni ne povas tro multe agi por Esperanto. Laŭ gazeto el Japanio, mi scias, ke iu japana esperantisto partoprenis la 59an UK en Hamburgo kaj elspezis pli ol 420 000 japanajn jenojn. Tiu sumo egalas al 1 400 usonaj dolaroj aŭ al 3 000 ĉinaj juanoj, kio ja por ni ĉinoj estas neimagebla elspezo. Por ke oni pli bone komprenu, mi klarigas mian propran financan situacion: Mi enspezas 32 juanojn monate, el kio 15 ĝis 18 juanoj elspeziĝas por la nutraĵoj, 8 ĝis 10 juanoj por la vestaĵoj, tabako, papero k.s., kaj do restas 4 ĝis 9 juanoj por la kostoj de mia internacia korespondado. Ĉiuj scias, ke la afranko de unu aerpoŝta letero kostas 0,52 juanojn, dum oni por unu ordinara Esperanta libro devas pagi 3 ĝis 5 juanojn. Se do io estas malfacila en nia Esperanto-movado, tio unuavice estas la ekonomia malriĉeco. Tio ja estas problemo, kiun oni ne povas solvi dum mallonga periodo, sed mi tamen fidus, ke ni en Ĉinio, iom-post-iome, solvos ankaŭ tion.

W.Y. Ubeko,
Poŝtkesto 104-2, Ĉadian-Stacio, Tiangin, Ĉinio



LA EDUKAJ FENOMENOJ DE TURISMO:

Ĉiĉerono kiel edukisto

Ĉe la eldonejo de la Varsovia Universitato oni preparas la aperigon de la doktoriĝa disertacio de Tyburcjusz Tyblewski, iama plurfoja gajninto de premioj en la tradukaj branĉoj de la Belartaj Konkursoj de UEA. La disertacio, "Eduka rolo de turisma ĉiĉeronado", libroforme ampleksos ĉ. 200 paĝojn kaj estos ilustrita. Ĝi ĉefe baziĝas sur la propraj ĉiĉeronaj spertoj de d-ro Tyblewski kaj sur aparta enketo realigita inter plurcento da esperantistoj el 28 landoj. Al la disertacio estas ligita ankaŭ dumonata studvojaĝo de la aŭtoro tra Francio, kie li prelegis en trideko da urboj. Ĉar la baldaŭ aperonta libro enhavos apartan ĉapitron pri Esperanto kaj ampleksan resumon en la Internacia Lingvo, ni petis d-ron Tyblewski prezenti la enhavon de sia studo al niaj legantoj.

NE SENARGUMENTE la nuntempo estas nomata "epoko de turismo", kion konfirmas la nombro de vojaĝantoj taksata je 150 milionoj en unu jaro. Kiel kaŭzoj de la fenomeno estas konsiderataj: plilongigo de la vivo, pligrandiĝo de enspezo en multaj landoj, evoluo de transportiloj, mallongigo de la labora kaj

plilongigo de la libera tempo de milionoj, urbiĝo de la mondo, evoluo de klerigo kaj — fine — apogo al turismo flanke de ŝtatoj kaj de UN.

Laŭ antaŭvido de la lingvisto M. Pei, la ŝancoj vojaĝi eksterlanden, se ne okazos neantaŭvideblaj katastrofoj, en la jaro 2000 estos 1:2.

Kiel faktorojn determinantajn la edukajn efikojn de turismo oni konsideras: la rolon kaj la socian pozicion de turisto, spertojn de turisto, personecon de turisto, valorojn de la vizitata medio, kondiĉojn de la vojaĝo kaj personecon de la edukisto. Ĉiĉerono estas tiu edukisto.

La nuntempa turisma ĉiĉeronaro atingis kvantan ekfloron en multaj landoj, (ekz. en Pollando, preskaŭ 12 mil ĉiĉeronoj, priservantaj dum unu jaro pli ol dek milionojn da turistoj).

Kun la impona evoluo kvanta ne harmonias la ŝanĝo kvalita, kies kaŭzoj estas diversaj kaj kies efiko esprimiĝas i.a. en la neplenumo de turismaj edukfunkcioj.


Apogiĝinte je la elektitaj aksiomoj, sociaj realaĵoj kaj propraj spertoj, en mia studo mi formulis kelkajn



hipotezojn koncernantaj la rolon de ĉiĉerono en la turisma edukado:

1. Elinter la personoj partoprenantaj turisman movadon ĉiĉeronoj (gvidistoj, kondukistoj) havas la plej multajn eblecojn influi turistojn.
2. Aspekto, konvinkoj, sinteno, scio kaj scipovoj de ĉiĉeronaro estas atente observataj de turistoj.
3. Nekono de faktoj devenas el nesufiĉa kleriĝo de ĉiĉerono al kiu mankas precipe la elementoj de psikologio, pedagogio kaj sociologio.
4. Tia stato elvokas relative ofte la situaciojn, dum kiuj la nescipovo agi koncerne al turistoj efikas kiel malaprobo por la modelo prezentata de la ĉiĉerono, anstataŭ alporti aprobon, kio el la eduka vidpunkto estas ja nepra.
5. La staton oni povas plibonigi i.a. per ŝanĝo de la preparprogramoj, per klara difino de la socia rolo kaj per priskribo de la ideala personeco de ĉiĉerono povanta servi kiel modelo en la edukado.
- 6 Por efikigi kaj universaligi la idealon, necesa estas ĝia akcepto de la ĉiĉeronaro, la kodigo de la fundamentaj sintenoj, kies formiĝon ebligos la individuaj motivoj kaj la socia stimulo.

La hipotezoj estas konfirmitaj en multaj opinioj de la enketitoj, i.a. ankaŭ esperantistoj pritraktitaj en aparta ĉapitro de la disertacio.



Formulinte la eduke idealan personecon de ĉiĉerono, la disertacio priskribas modelon de la reale renkontataj trajtoj kaj ecoj de la ĉiĉeronaro, teorie kreante grupojn de la necesaj sintenoj, kiujn mi nomis: la naturaj, la kulturaj kaj la interpersonaj sintenoj.

La sintenoj karakterizu ĉiun ĉiĉeronan personecon, se ĝi estu preta por plenumi sian edukan rolon. Krom la personeco decidas tamen la socia rolo, kian oni permesas plenumi al la edukisto. La rolo kongrua, interne harmonia, apogita je la ekvilibro inter la rajtoj kaj la devoj de ĝia plenumanto, garantias edukan efikecon.

Spite al la supra vidpunkto, ke oni eduku ĉefe junularon, la disertacio — profitante atingojn de andragogio — klopodas prui la eblecon kaj devon eduki ankaŭ plenaĝulojn, kiuj i.a. dank'al turismo povas partopreni la procezon de la konstanta mem-edukiĝo kaj atingi tion, kion ili ne ricevis dum la junaĝo.

La enketitaj esperantistoj liveris al mi tre valorajn opiniojn, kiujn mi multnombre citis en la studo.

Tyburcjusz Tyblewski

ĈIUJ FOTOJ, kiuj akompanas ĉi tiun artikolon, montras pejzaĝojn el la montaro Karkonoŝo en Pollando, kaj estas faritaj de s-ro Antoni Walczak, Jelenia Góra, Pollando.

Bataalkampo serĉas heroojn

EN MOVADO, kiu tiel zorge notas siajn jubileojn, proklamante jubilea ĉion kio ne fiaskas dum la unuaj du okazigoj, ne estas superflue prinoti ankaŭ la malagrablajn, la tristajn "jubileojn" kaj ripetajn malsukcesojn. Unu el ili sendube estas la Internacia Ekzameno de UEA, kies regularo ekvalidis la 1an de januaro 1961. Do, en ĉi tiu jaro la Internacia Ekzameno notos sian 15-jaran ekziston, sed ĝi en tiu tuta periodo ne sukcesis liveri al la Movado kaj ĝia kulturo pli ol kvar posedantojn de la Internacia Diploma pri supera instrukapablo de la internacia lingvo Esperanto. La listo de la diplomitoj ne estas tiel longa, ke ni evitu refoje prezenti ĝin: d-ro A. Albault, Francio (diplomiĝis en 1961), f-ino C. Taverna, Italio (1965), s-ro M. Panĉev, Bulgario (1965) kaj s-ro R. Hauptenthal, FR Germanio (1968). La listo tie elĉerpiĝas, devigante nin konkludi, ke dum la lastaj ses jaroj, verŝajne unu el la plej facilaj taskoj en la internacia Esperanto-movado estis sekretarii ĉe la Internacia Ekzamena Komisiono de UEA.

Ne malofte oni aŭdis kritikojn pri la tro altaj postuloj de la Internacia Ekzameno. Tamen, se la Diploma atestas pri la instrukapablo je la supera, do universitata, nivelo, oni prefere ne faru premon pri la mildigo de la ekzamenaj kriterioj, des pli, ke oni en la Movado apenaŭ havas aliajn instituciojn, kiuj konservas la kutime eĉ pli severajn kriteriojn de la ekstermovadaj institucioj. Anstataŭ plendi pri la tro altaj postuloj de la Internacia Ekzamena Komisiono, oni prefere lernu, aperu en la Ekzameno kaj per la nombro de la Diplomoj pruvu, ke la Esperanto-movado kapablas transpreni la instruajn taskojn, se oni samtempe en pluraj universitatoj decidus ekinstrui la Internacian Lingvon. Cetere, ĉi tiu revuo havas ankaŭ "privatan" kialon plendi por pli da atento al la Ekzameno: fariĝas jam tede dum 15 jaroj ripetadi la alvokojn, kiuj restas seneĥaj.

En la kadro de la 60a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) denove ekzamenos kandidatojn por la Internacia Diploma. Al la Ekzameno povas esti allasita nur persono, kiu sukcese finis per diplomiĝo minimume mezgradan lernejon kaj kiu plene posedas la Internacian Lingvon. Ĉiu, kiu deziras kandidatiĝi por la Internacia Ekzameno, bonvolu sendi, laŭeble plej frue, esperantlingvan tradukon de la diploma pruvanta, ke la kandidato



Hero-serĉantoj: La Ekzamena Komisiono en 1966 (Boulton, Régulo, Baghy, Sadler) serĉis vane diplomoton.

finis mezlernejon, al la adreso de la sekretario de la IEK: **d-ro J.C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, Britio.** La limdato por la kandidatigo estas **la 30a de aprilo 1975.** Bonvolu noti, ke al la diplomtraduko, kiun cetere devas konfirmi kompetenta instanco, necesas aldoni ankaŭ ateston pri sukcese plenumita supera ekzameno de Esperanto en sia lando, aŭ alian pruvon pri plena posedo de la lingvo.

La aliĝkotizo por la Ekzameno estas 7,20 ned. guldenoj, kaj ĝi devas esti pagita samtempe kun la kandidatigo. Kompreneble, ke por la kandidatoj, kiuj ne povas transpagi la kotizon, sed vere intencas ĉeesti la Kongreson kaj aperi antaŭ la Komisiono, ekzistas ebleco de speciala arango tiurilate.

Laŭ la Regularo de la Internacia Ekzamena Komisiono, sukceso en la Ekzameno devas "atesti, surbaze de rigora ekzameno, la kapablon instrui Esperanton je supera nivelo". La kandidatoj do atendu ekzamenon, kies kriterioj similas tiujn por universitata diploma. Konvenas noti, ke detala regularo kaj listo de rekomendita literaturo estas riceveblaj de la sekretario de IEK aŭ de la CO de UEA. Ĉe la Centra Oficejo estas mendebla ankaŭ listo de 79 specimenaj demandoj, kiuj efektive estis prezentitaj en la Internacia Ekzameno inter 1962 kaj 1972. Tiuj demandoj donas al la kandidato klaran imagon pri la speco de ekzameno, kiun li frontas. La prezo de tiu specimena demandaro estas 3 respondkuponoj (1,80 gld.), inkluzive la sendokostojn.

Nu, jen la bataalkampo, kiu serĉas heroojn! Necesas nur iom da kuraĝo kaj sufiĉe da scio, kiu ĉe multaj potencialaj kandidatoj sendube ĉeestas kaj bezonas nur iom da sistemigo kaj kompletigo antaŭ ol aperi ĉe la Ekzameno kaj poste aliĝi al tiu elita kvaropo, kies ekskluziveco minacas fariĝi unu el la plej strangaj trajtoj de la nuntempa Esperanto-movado. Kiam temas pri nia revuo, ni sopiras intervjui por la septembra numero de ĉi tiu jaro almenaŭ kelkajn novajn diplomitojn de la Internacia Ekzameno.

La unua lernolibro

KVANKAM la vastega teritorio kaj eŭropeca lingva bunto de Hinda Unio ofte estis menciataj kiel "fekunda grundo" por propagandi la Internacian Lingvon, oni ne faris multajn organizitajn klopodojn tiurilate. Malgraŭ la fakto, ke la unuaj esperantistoj en la tiama Brita Hindio aperis jam komence de la jarcento kaj la unuaj Esperanto-grupoj fondiĝis en Bombajo kaj Kalkato en 1906, ankoraŭ neniam oni povis paroli pri la ekzisto de vera Esperanto-movado sur la hinda duonkontinento. Seriozaj klopodoj firmigi la Movadon tie, neniam estis faritaj, kvankam unuopuloj faris grandegajn personajn streĉojn tiurilate.

En tiu vico de unuopuloj, kiuj agis sur la hodiaŭa teritorio de Hinda Unio, elstaras tri nomoj: la angla kolonelo John Pollen en la unuaj du jardekoj de la jarcento, bengala instruisto Lakṣmīśvar Sinha ekde la tridekaj jaroj ĝis hodiaŭ, kaj dum la lastaj 15 jaroj s-ino Madeleine Haudebine, al kies agado ni revenos en unu el niaj proksimaj numeroj (v. la rubrikon "Persone" en ĉi tiu numero de la revuo).

Se oni serĉas la kaŭzojn pro kiuj la multaj klopodoj starigi la Movadon en ĉi tiu lando neniam donis el internacia vidpunkto atentindajn rezultojn, ne estas malfacile identigi ilin. Efektive, sufiĉas nur unu el tiuj kaŭzoj, klara per si mem, akuzanta tiujn, kies tasko estis zorgi pri la monda disvastiĝo de Esperanto. Temas pri la embarasa konfeso, ke ĉiuj ĝisnunaj klopodoj disvastigi Esperanton en Hinda Unio okazis pere de la angla lingvo. Neniam ankoraŭ aperis ia ajn lernilo de Esperanto en iu ajn el la multegaj lingvoj de Hinda Unio. Tial, pli ol bona novaĵo estas, ke ni nun povas anonci la aperon de du tiaj eldonaĵoj.

Dum sia kunsido en la kadro de la 58a UK en Beogrado, la Estraro de UEA decidis subvencii la

eldonon de la bengala lernolibro de Esperanto, verkita de L. Sinha, per la sumo de 3 000 hindaj rupioj (ĉ. 1 000 ned. gld.). Post multaj klopodoj, la aŭtoro de la lernolibro informas, ke fine de la jaro 1974, la lernolibro estas jam komplete presita kaj baldaŭ estos aĉetebla. Preskaŭ samtempe, s-ino Haudebine informis, ke finpretiĝas informfolio pri Esperanto en pluraj hindaj lingvoj. Laŭ rekomendo de la Komitato en Hamburgo, la Estraro de UEA decidis subteni tiun eldonon per 700 hindaj rupioj.

Se la Movado en la estonteco iom pli zorge rilatos al tiuj mondpartoj en kiujn la Internacia Lingvo ĝis nun apenaŭ penetris, se oni stimulos provojn kompili kaj eldoni lernilojn ankaŭ en aliaj lingvoj de Hinda Unio kaj aliaj aziaj landoj, se oni pozitive reagos al la pledo de d-ro Corsetti pri la agado en Afriko (v. la decembran numeron de nia revuo, p. 203-205), tiam la Esperanto-movado fariĝos ne nur surpapere sed ankaŭ vere tutmonda. Ni ripetu, ke necesas stimuli kaj instigi, ke ne sufiĉas atendi, kion bele montras la kazo de Hinda Unio.

Recenzoj

Ekzakteco de reprodukto

Recenzas G. Waringhien (Francio):

Antaŭen al la laboro!, plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 3. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1974. 344p. 22cm. Bind.

Jen, kun miriga konstanteco, jam la tria volumo de la plena verkaro de Zamenhof, kompilita de la japana anonimulo, kaj entenanta la zamenhofaĵojn de la jaroj 1892-1895 kun longa postparolo, en kiu troviĝas la listo de la verkoj tiuperiodaj el la "Biblioteko" (n-roj 53-85) kun la reklamaĵoj aŭ recenzoj, la detala enhavtabelo de la n-roj de *La Esperantisto* kaj du indeksoj, laŭtema kaj kronologia.

La pritraktita periodo estis unu el la plej gravaj en nia historio: post la rezigno de Z. plu aperigi la gazeton pro manko de mono, Trumpeter komence de 1892 prenis sur sin la preskostojn kaj salajron de la redaktoro (t.e. Zamenhof); sed li metis la kondiĉon,



Propra sidejo de la Bengala Esperanto-Instituto: Verko de izoluloj, kies entuziasmo estas admirinda.

ke la lingvo estu reformita. Tial Z., malgraŭ sia profunda konvinko, ellaboris, utiligante la proponitajn modifojn, sian projekton de nova Esperanto. Oni scias, ke tiu projekto estis fine rifuzita de 157 voĉoj kontraŭ 107 (Z. mem kaj tiuj, kiuj konfidis al li sian voĉon, sin detenis). Ni ne havas atestojn pri la reago de Trumpeter, sed la demando pri la daŭrigo de lia mon-ofero estis abrupte tranĉita de la cara malpermeso plu eldoni en Rusujo la gazeton kaj la Bibliotekon. La epoko de la ĵurnalista aktiveco de Z. finiĝas do kun tiu volumo, kiu, krom la pecoj jam publikigitaj en la *Originala Verkaro*, entenas ĉ. 50 aliajn, kaj precipe la tutan detalaron de la reformprojekto, ĝis nun konata nur de la eksterkomerca represio, kiun Couturat aperigis kiel precedenton al Ido, en 1907.

La tuto prezentas la saman senriproĉan aspekton, kiel la du antaŭaj volumoj, kaj la saman ekzaktecon en la reprodukto de la tekstoj. Unu kritikon: la la kompilinto uzas anglisme "kopio" anst. "ekzemplero": kopio ne povas esti "aŭtentika" (nur maksimume, aŭtentikigita de ia instanco!).

Mendu ĉe UEA: 20,— (por Nederlando 20,80) gld. plus sendokostoj 10%.

Baza biologia nociaro

Recenzas G.F. Makkink (Nederlando):

Enkonduko en ĝeneralan biologion, de C. Støp-Bowitz. Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj, 1974. 92p. 29cm. Ofsetita manuskripto.

Por la medicina fako de la ĉi-jara sesio de Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo, la konata natursciencisto traktis kelkajn bazajn biologiajn nociojn. En apartaj ĉapitroj estas prezentitaj: la ĉelo, la ĉeldividiĝo, la reproduktiĝo (du ĉapitroj), la disvolviĝo de la individuo, sistematiko kaj nomenklaturado, kaj la evoluo de la homo (du ĉapitroj). Per tre klara teksto la studanto estas enkondukata en la materion, kiun, bedaŭrinde, akompanas nur la plej necesaj desegnaĵoj. Oni povas demandi sin ĉu en nia tempo nocioj kiel ekosistemo, populacia dinamiko, energiuzado ktp. povus manki en ĉi tia verko, sed, kompreneble, la aŭtoro devis limigi sin.* La studanto renkontos en la teksto nomojn de bestoj tute nekonataj al li; por tiuj li konsultu zoologian lernolibron, kvankam, plej ofte jam PIV helpas al orientiĝo. Kelkaj nocioj estas neklarigitaj: *niĉo*, *ĥemitropismo*.

Por indiki speciojn la aŭtoro uzis sian propran sistemon; en tio la scienca nomo estas fidele tradukita en Esperanton. En tre multaj kazoj tio estas konvena metodo por ne tre konataj organismoj, sed ofte oni

* Prof. Støp-Bowitz verkis apartan kursolibron pri "Elementa ekologio" (vidu recenzon en oktobro, p.174).



Carl Støp-Bowitz: aŭtoro de pluraj kursotekstoj por Someraj Universitataj Kursoj, nun vicprezidanto de UEA

ricevas ne akcepteblajn nomojn kiel ekz. en la kazo de la triĉterma nomo *Homo saĝa saĝa*. Esperanto ne estu ĝenata de la monstraĵoj de la scienca nomenklaturado, nek de ĝia ŝanĝiĝeco! .

Anstataŭ kelkaj vortoj mi preferus aliajn ekz. koncentriteco anst. koncentriĝo, ĉelvando anst. ĉelmuro, bovo anst. bruto (p. 41). Preseraroj estas tre malmultaj; ekz. 1m devas esti 1cm sur p. 47 malsupre.

Mendu ĉe UEA: 20,40 (por Nederlando 21,22) gld. plus sendokostoj 10%.

Amuza libreto

Recenzas Alec Venture (Britio):

Premiitaj kaj aliaj noveloj, de Tibor Sekelj. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1974. 52p. 16cm.

Oni jam sciis, ke Tibor Sekelj estas denaska rakontisto; ĉi tiu libreto tion klare konfirmas. Ĉiu el la rakontoj estas interesa, kelkaj estas ankaŭ amuzaj (precipe *La sciuro*), kaj la lingva stilo estas klara. Oni povas rekomendi la verkon al tiu, kiu serĉas rimedon por agrable pasigi unu-du horojn; aĉetinto certe ne damaĝos la koston.

Pro la ĝenerale kontentiga nivelo de la lingvaĵo mi tamen permesas al mi mencii iujn malglataĵojn. La esprimoj: *ŝajnis al mi diveni* (p. 23), *ŝajnis al mi vidi* (p. 21) kaj *al mi ŝajnis legi* (p. 42) ŝajnas al mi strangaj! Prefere oni skribu: *ŝajnis al mi, ke mi divenas*; ... *ke mi vidas*; ... *ke mi legas*. Dufoje aperas la formoj *smaragdo* anstataŭ *smeraldo* kaj *epruveto* anstataŭ *prov tubo*. Troviĝas ankaŭ dekduo da preseraroj.

Mendu ĉe UEA: 5,40 (por Nederlando 5,62) gld. plus sendokostoj 10%.

KONDIĈOJ DE RECENZOJ

La revuo *Esperanto* principe recenzigas duope ricevatajn novajn librojn kaj diskojn, escepte de nete politikaj. Pri pli gravaj religiaj eldonaĵoj aperas recenzoj neŭtralaj. Eldonaĵojn unuope ricevatajn ni nur mencias. Recenzoj nepetitaj ne aperas.

Zamenhof ĉe la florpoto

Recenzas Ulrich Lins (FR Germanio):

Granda galerio Zamenhofa, de Adolf Holzhaus. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1973. 527p. 30cm. Bindita.

La verko reproduktas pli ol 950 fotojn, kiujn la aŭtoro kolektis dum la pasintaj 15 jaroj. Inter ili troviĝas granda nombro de fotoj, parte nekonataj, de Zamenhof kiel ankaŭ de liaj familianoj. Sekvas bustoj kaj pentraĵoj, titolpaĝoj de verkoj de Zamenhof, kelkaj leteroj kaj poŝtkartoj, fotoj de monumentoj kaj memortabuloj dediĉitaj al la

“Majstro” kaj je la fino reproduktaĵoj de peticioj, i.a. la rifuzita petskribo de 1888 09 12 al la cara cenzuro pri eldono de semajna gazeto en Esperanto. Tiun ĉi peticion, same kiel la tekston de atestoj kaj diplomoj, Holzhaus provizis per Esperanta traduko.

Oni devas admiri la kolektokapablon de Holzhaus. Tamen, malpli salutinde estas, ke li ŝajne sen ia selektemo deziris inkluzivi en tiun ĉi albumon praktike ĉion, kio havas rilaton al Zamenhof (kun la surpriza escepto, ke mankas reproduktaĵoj de glumarkoj ornamitaj per lia kapo). Ni trovas, do, Zamenhof en ĉiuj imageblaj pozoj, sprite komentitaj de Holzhaus: “Z dekstra brako horizontala”, “Z ĉe florpoto”, “Z en brakseĝo; 3 fingroj”, “Z; dekstra mano ĉe kapo”, “Z ridetanta kun franca ordeno”, “Z; stelo kun sia nigra vesto”. Ne mankas eĉ “Z ĉe futballudo”. Sendube utilaj estas la malnovaj fotoj de Bjalistoko, sed kial Holzhaus tiel malavare reproduktis bildkartojn el preskaŭ ĉiuj urboj, kiujn Zamenhof foje vizitis? Restas por noti, ke aldonitaj estas ankaŭ fotoj tute sen rilato al Zamenhof, ekz. “Adolf Holzhaus kun blanka urso 1958”.

La tuto ŝajnas frapa indico pri tio, ke la nuntempa ondo de nostalgio ne preteriras la Esperanto-movadon. Signifas, ke oni povas kalkuli pri bona disvendiĝo de tiu ĉi giganta verdaĵo.

Mendu ĉe UEA: 72,30 (por Nederlando 75,19) gld. plus sendokostoj 10%.

Laste aperis . . .

Babilante dum la irado 14p. Ilus. 13x20cm. Broŝ. Komerca perspektivo de la vinkelo Cavas Codorníu, San Sadurní de Noya, Hispanujo.

Cvičebnice Esperanta J. Cink. Praha: Státní Pedagogické Nakladatelství, 1974. 175p. 21cm. Kartone bind. 4,20 gld. Ekzerclibro por progresantoj.

El la vivo de bervalasentaŭgulo L. Beaucaire (1925-). La Laguna: Régulo, 1974. 134p. 18cm. Broŝ. 9,— gld. Laŭ la subtitolo “maldeceta epizodaro”, krome kun dozo da esperantomovada humuro.

Enkonduko en ĝeneralan biologion C. Støp-Bowitz. Liège: Someraĵ Universitataj Kursoj, 1974. 92p. 29cm. Broŝ. 20,40gld. Kursoteksto.

Esperanto en Perspektivo, Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo I. Lapenna, ĉefredaktoro (1909-), U. Lins, redaktoro (1943-), T. Carlevaro (1945-). London/Rotterdam: CED, 1974. 876p. Ilus. 20cm. Bind. 84,— gld. Enciklopedia gvidilo pri la historio, nuna stato, kaj estonteco de Esperanto, celanta prezenti la ĝisnunajn atingojn de la Internacia Lingvo kaj doni al ĝiaj nunaj disvastigantoj fonton de fidindaj kaj detalaj informoj. Multaj el la faktoj kaj informoj aperas unuafoje en presa formo. Tre detalaj finaj indeksoj kaj referencoj inter la diversaj ĉapitroj kaj sekcioj faciligas la konsulton.

Informado kaj dokumentado pri kemio S. Kawamura. Liège: Someraĵ Universitataj Kursoj, 1974. 43p. Broŝ. 13,20 gld. Vasta diskuto pri la problemoj de la informadiko de kemio.

Kemio de manĝaĵoj, ĉefe novaj proteinoj S. Kawamura. Liège: Someraĵ Universitataj Kursoj, 1974. 91p. 29cm. Broŝ. 20,40gld. Kursoteksto kun aparta atento al la serĉo de novaj nutrurimidoj; aparte ampleksa bibliografio.

Pensoj el Valdeno H.D. Thoreau (1817-1862). Trad. B. McClafferty. Toronto: la tradukinto, 1973. 15p. 13cm. Broŝ. 2,70 gld. Fragmentoj el la fama verko *Walden* de la usona verkisto, laŭdaj al simpla vivmaniero. La libro estas produktita laŭ teksto bele kaligrafita de M. Keller, do ankaŭ bibliofiliaĵo.

Perdita vizaĝo, La J. Nesvadba (1926-). El la slovakia trad. A. Staňura. Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1974. 111p. Ilus. 20cm. Broŝ. 4,20 gld. Dek sciencfikciaj rakontoj.

Skolta kaj tenduma terminaro J.K. Hammer. Zaandam: Skolta Esperanto-Ligo, 1974. 44p. 21cm. Broŝ. 4,20 gld. Kolekto de ĉ. 200 terminoj klarigitaj jen per difinoj jen per ilustraĵoj, kun aliaj utilaj informoj.

Tornistro, La; n-ro 3 Red. E. de Bonaero. Buenos Aires: Argentina Esperanto-Instituto, 1974. 48p. Ilus. 21cm. 5,— gld. Plia kolekto da variaj prozaĵoj kaj versaĵoj laŭ la stilo de la antaŭaj.

Ulenspieghel, tio estas Strigspegulo El la nederlanda trad. P. Wolrug. Amsterdam: Vulpo, represo 1974. 15p. Ilus. 15cm. Broŝ. 1,80 gld. Tradiciaj rakontoj pri popolheroo vivinta en la 14a jarcento, kun ilustraĵoj el verko eldonita ĉ. 1500.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

LA 31a INTERNACIA JUNULARA KONFERENCO DE TEJO

1975 07 19 – 07 26

Fredericia, Danlando

Adreso: La 31a IJK,

Christian Lauridsen, Østergade 43,

DK-7430 IKAST, Danlando.

Al Fredericia

KLOPODANTE venki la prokraston de la prepar-laboroj, de kiuj multo devis okazi jam antaŭ ol oni decidis, ke la ĉi-jara Internacia Junulara Konferenco de TEJO okazos en Fredericia, la LKK de la 31a IJK donas impreson de verva kaj agema teamo. Meze de decembro 1974 aperis neampleksa, sed plaĉa kaj informriĉa informilo pri la Konferenco.

Kiel ni jam anoncis en nia decembra numero (p. 214), la ĉeftemo de la 31a IJK estos “Kultura interŝanĝo”. La provizora programo antaŭvidas, krome, jenajn programerojn: interkona balo, dana vespero, KER-seminario “Lingvo kaj malkoloniigo”, vespero de mal-multe konataj kulturoj, ekskurso, kunsidoj de la TEJO -Komitato, grupo de interesitoj pri popoldancoj, vizitoj al la urbo kun esperantlingvaj gvidantoj, diskutoj en laborgrupoj, balo ktp. En la kadro de la konferenca ĉeftemo, oni planas aparte akcenti la malgrandajn landojn kaj iliajn kulturojn,

rilatante kritike al unu el la fenomenoj de la hodiaŭa mondo — kultura superrego de la grandaj nacioj. Gravan rolon en ĉi tiuj klopodoj ludas la planoj konigi al la partoprenontoj la danan kulturon, ne nur per la propraj fortoj de la organizantoj, sed ankaŭ per helpo de neesperantistaj danaj junularaj grupoj.

La 31a IJK okazos en la moderna kaj nova “Fredericia -hallen”, kiu donas eblecojn ne nur por konferencaj laboroj, sed ankaŭ por distro kaj diversaj sportoj. La partoprenontoj de la Konferenco loĝos en “Alléskolen”, situanta apud la konferencejo. Laŭ la lastaj informoj ricevita de la organizantoj, oni ankaŭ manĝos en restoracio tuj apud la kongresejo kaj ne necesos organizi specialan aŭtobusan “IJK-linion” kiel okazis en Münster pasintjare.

La kotizoj, kiuj inkluzivas la aliĝon kaj la kostojn de la restado en Fredericia dum la konferenca semajno, aspektas jene (en danaj kronoj):

	PERIODO:			
	Antaŭ la 31a	Antaŭ la 31a	Antaŭ la 30a	Dum julio
KATEGORIOJ:	de jan.	de mar.	de jun.	1975
Malpli ol 20-jaraj	250	275	300	325
20–24-jaraj	275	300	325	350
25–29-jaraj	300	325	350	375
Pli ol 30-jaraj	325	350	375	400

Ĉi tiuj kotizoj validas nur por la partoprenantoj, kiuj estas individuaj membroj de TEJO/UEA. La aliaj pagas krome 25 danajn kronojn.

La aliĝilojn oni sendu al la adreso de la 31a IJK (v. komence de ĉi tiu paĝo). Ĉe la sama adreso oni petu ankaŭ ĉiujn informojn pri la Konferenco. Samtempe kun la aliĝilo, pagu la koncernan kotizon al: Poŝtĉekkonto n-ro 9 266267, “TEJO-Kongresen 75”, Thunøgade 26-4, DK-8000 Aarhus C, Danlando. Aliĝantoj el la landoj kun transpagaj problemoj bonvolu aparte skribi al LKK pri tio.

Kontakto la dika

FINE DE 1974 aperis nova numero de la ĉiam pli populara revuo de TEJO *Kontakto*. Normale oni ne notas la aperon de unuopaj numeroj de periodaĵoj, sed en la kazo de *Kontakto* tio ne ŝajnas esti superflua, ĉar ĝi laŭ la prokrastoj proksimiĝas al *La Monda Lingvo-Problemo* kaj *Pola Esperantisto*. Klopodante ĝisdatigi la revuon, la redaktoroj decidis ĉi-foje eldoni duoblan numeron, kiu portas la indikon “n-ro 2-3/74” kaj, anstataŭ 20, ampleksas 32 paĝojn.

Kiel konate, *Kontakto* dum la lastaj jaroj elkreskis en revuon, kiu traktas aktualajn temojn de la hodiaŭa mondo. En la n-ro 2-3/74 oni trovas kontribuojn pri jenaj temoj: Lingvo kiel ilo de subpremado, Atoma danĝero, Seminario pri “Lingvo kaj socio” en Münster, Preparoj por la Ĉarto pri minoritatoj,

Universitato en la israela dezerto, “La milito de infanoj” en Norda Irlando, La balta identeco en Sovet-Unio, Armiloj kaj kapablo de milfoja mortigo, Kien iras la t.n. naftodolaroj?, La nuntempaj problemoj de Britio, La retrovitaj notlibroj de Leonardo da Vinĉi, Eskapo en la idilion de simpleco (hodiaŭa literaturo de Italio), Plasto — la vaganta rubo, kaj — el la movadaj temoj — fragmento el la ĵus aperinta *Esperanto en Perspektivo* kaj novaĵoj pri la ĉi-jara Internacia Junulara Konferenco de TEJO. La tuta numero estas escepte riĉe ilustrita.


Necesas tamen memorigi niajn junajn legantojn, ke *Kontakto* daŭre aperas kun subvencioj el la kaso de TEJO/UEA kaj, se en la proksima estonteco ne pligrandiĝos la nombro de ĝiaj abonantoj, oni devos rekonsideri la ekonomiecon de ĝia plua eldonado. Ne sufiĉas nur laŭdi la junularan revuon, sed necesas subteni ĝin per vasta varbkampanjo por pliaj abonantoj, des pli, ke ĝia abono por ĉi tiu jaro kostas nur 13 nederlandajn guldenojn.



60a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Kopenhago (Frederiksberg), 1975 07 26 – 08 02.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Postboks
1503, DK-2700 Brønshøj, Danlando.



TIVOLI, la mondfama amuzejo de Kopenhago, volonte
akceptos ankaŭ kongresanojn, kiuj serĉas distron.

Aŭtobuse el Francujo

Cirkulero el Parizo anoncas karavanveturon al la UK
en Kopenhago per privata aŭtobuso por 40 personoj.
La grupo tranoktos survoje interalie en Rotterdam.
Pli detale informas la interesigantojn: Unuiĝo Franca
por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris
(tel. (1) 278-68-86).

Tre verŝajne ni povos baldaŭ anonci ankaŭ la sesan
karavanon al la UK – el Nederlando.

Postkongresi en Aarhus

En Aarhus, la dua urbo de Danlando laŭ grandeco,
meze de pentrinda kamparo kaj proksime de arbaroj
kaj marbordo, okazos la Oficiala Postkongreso, tuj
post la Universala Kongreso. Detaloj kaj aliĝilo aperos
en la Dua Oficiala Bulteno.

Antaŭkongresi? – Bonvolu elekti!

Kiam temas pri kombino de la Kopenhaga Kongreso
kun antaŭkongresa aranĝo, jam estas anoncitaj pluraj
eblecoj por via elekto. KELI (la ligo de evangeliaj
kristanoj) kongresos en Jönköping, Svedujo de la 19a
ĝis la 26a de julio, same kiel la junulara sekcio de
UEA, TEJO, kiu konferencos en Fredericia, Dan-
lando. Pli fore, en Svislando okazos kurso pri
tradukado el kaj al Esperanto, en La Chaux-de-Fonds,
urbo konatiĝanta en la Esperanto-movado pro sia
Kultura Centro kun impona biblioteko. La bonfamaj
Internaciaj FERIAJ Esperanto-Kursoj en Helsingør,
Danlando, okazos ĉi-jare de la 20a ĝis la 26a de julio.
(Pri ili vidu la reklamon en ĉi tiu numero).

Populara bulteno

La freŝ-impresa, kolorilustrita Unua Bulteno de la 60a
UK evidente vekis nekutiman interesigon, ĉar la tuta
eldonkvanto (15 000 ekz.) estas jam elĉerpita.
Kvankam estus sufiĉe embarase por la organizantoj, se
aliĝus 15 000 kongresanoj por Kopenhago, ni tamen
esperas...

SUBTENU

60a Universala
Kongreso
de Esperanto
Kopenhago
26.7 - 2.8 '75



la 60-an (jubilean)
Universalan Kongreson
de Esperanto, uzante sur
viaj korespondaĵoj la
allogan trikoloran
glumarkon!
100 markoj kostas,
inkl. sendokostojn,
5,50 gld. (por
Nederlando 6,— gld.).
Mendu ĉe UEA.

Hispanio

• Grupo de aktivuloj ĉe Centro de Esperanto Sabadell anoncis mon-kolektan kampanjon "cele al likvido de la UEA-deficito". La kampanjon organizas s-ro L. Serrano Pérez (Fuente Nueva 32, Sabadell, Barcelona), la sekretario de la Centro. Tiu ĉi esprimo de solidareco kaj fido al UEA estas des pli grava nun, kiam en la periodaĵo de la Hispana Esperanto-Federacio, *Boletín*, komencas aperadi kontribuaĵoj, kies celo estas subfosi la fidindecon de la novaj gvidorganoj de UEA.

Svislando

• Dum sia aŭtuna kunsido, meze de septembro 1974, la Estraro de Svisa Esperanto-Societo, aliĝinta landa asocio de UEA, notis bonan financon staton de SES, konstatis konstantan membro-kreskon kaj decidis por la jaro 1974 pagi la kotizon por 200 asociaj membroj de UEA (anstataŭ por 120 kiel en 1973). SES samtempe decidis subteni CED per 200 svisaj frankoj, kun emfazo, ke tiu donaco iru kiel helpo por kovri la kostojn de la transporto de CED-arkivo el Londono al Roterdamo. Efektive, la donaco kovris duonon de tiuj kostoj.

Jugoslavio

• *La Suda Stelo*, kiu dum longa tempo estis unu el la plej prestiĝaj landaj revuoj en Esperanto, ĉesis aperi fine de la jaro 1973, kaj ankoraŭ ne aŭdiĝas anoncoj pri ĝia revivigo. En la lando nun aperas pluraj stencilitaj bultenoj, inter kiuj la plej bona ŝajnas esti *Voĉo*, monata periodaĵo de la Esperanto-societo en malgranda industria urbo Borovo. *Voĉo* klopodas ŝtopi la breĉon, estiĝintan pro la manko de tutlanda movada periodaĵo, kaj notas konsiderindajn sukcesojn tiurilate. Kvankam stencilita, ĝi estas enhave riĉa kaj teknike bone prizorgita.

Brazilo

• Jam 15 jarojn, en la urbo Gov. Valadares (federacia ŝtato Minas Gerais), s-ro Jairo Pereira Rezende havas juvelejon, kiu portas la

nomon "Relojoaria Esperanto" (v. la supran foton). Kompreneble, la juvelisto ne nur reklamas, sed ankaŭ parolas la Internacian Lingvon.

• Komitatano de UEA, prof. Elvira Fontes, ĵus informis nin, ke la 18an de novembro 1974, la guberniestro de la brazila federacia ŝtato San-Paŭlo proklamis novan leĝon, laŭ kiu la 15a de decembro estas proklamita "Tago de la Internacia Lingvo Esperanto". En la proklamo de la guberniestro estas dirite, ke la nova festotago estas "manifestota ĉiujare je la 15a de decembro, naskiĝa datreveno de la pola kuracisto kaj lingvisto Lazaro Ludoviko Zamenhof". Prof. Fontes diras, ke la plej grandajn meritojn por la

nova leĝo havas la deputito, prof. Solon Borges dos Reis, prezidanto de la plej granda brazila organizaĵo de instruistoj.

FR Germanio

• En Paderborn, kiu post Hamburgo ŝajnas esti en la Esperanta gazetaro la plej ofte menciata germana urbo dum la pasinta jaro, la 25an de novembro 1974 fondiĝis loka Esperanto-societo. La fondkunveno, kiun ĉeestis plurdeko da personoj, elektis kiel prezidanton d-ron Hans Kassermann, dum la sekretario taskon transprenis unu el la plej konataj germanaj esperantistoj dum la lastaj jaroj — s-ro Hermann Behrmann.

Interlingvistiko


• Antaŭ kelka tempo, en Romo aperis la libro *La inventitaj lingvoj* de prof. Alessandro Bausani, kiu lekcias pri la islama kulturo en la Universitato de Romo, kaj estas konata nomo en la internaciaj rondoj de lingvistoj. Kompreneble, la verko pritraktas ankaŭ Esperanton, des pli, ke la aŭtoro jam en la enkonduko diras: "Mi, kvankam sen dogmemo, kaj sen troa agemo, kaj ĉe skandalo de multaj miaj kolegoj, estas esperantisto."

• Prof. d-ro Richard E. Wood, kiu antaŭ kelka tempo fariĝis la redaktoro de *LMLP*, fine de la jaro 1974

komputore prilaboris la enketon faritan inter la kongresanoj en Hamburgo. En unu el niaj postaj numeroj ni raportos pri la enketo.

Astronomio

• Robbert C. Groeneveld, iama aktivulo en la junularaj kaj studentaj rondoj de la Movado, meze de septembro 1974 doktoriĝis pri astronomio ĉe la Universitato de Groningen, Nederlando. La disertacio, kies titolo estas *Analizo de kromosferaj emisiaj linioj dum la suneklipso de 1962*, ĵus aperis libroforme, en la angla, kun resumoj en la nederlanda kaj Esperanto.



Fake

Teatro

- Centro de Esperanto Sabadell (Apartado 407, Sabadell, Barcelona, Hispanio), ĉe kiu aktivas amatora teatra grupo, anoncas internacian literaturan konkurson por gajaj teatraĵoj. Oni planas aljuĝi du premiojn, kiuj konsistos el plursemajna senpaga restado en la fama turisma regiono "Costa Brava". La limdato de ĉi tiu konkurso, kiu celas stimuli la plej magran branĉon de la Esperanta literaturo, estas la 15a de marto 1975. Pliajn informojn petu ĉe la supre indikita adreso.

Fervojistoj

- BEFA estas la belga sekcio de IFEF. Jam dum pluraj jaroj ĝi organizas sukcesajn korespondajn kursojn de Esperanto. De tempo al tempo, oni praktikas ankaŭ la organizon de regulaj unutagaj seminarioj dum kiuj la partoprenantoj de la korespondaj kursoj povas ricevi buŝajn instrukciojn kaj klarigojn. La lasta el tiaj aranĝoj okazis la 23an de novembro en Bruselo, sub la gvido de s-roj: De Sutter, De Bruine kaj Van Humbeeck.

Medicino

- Antaŭ kelka tempo atingis nin nova faka eldonaĵo de medicinistoj. Temas pri *Medicina heroldo*, organo de la Brazilia esperantista kuracista rondo (Poŝtkesto 14, Venda Nova, BR-30000 Belo Horizonte, Minas Gerais, Brazilo), kies unua numero, aperinta en julio 1974, enhavas plurajn fakajn artikolojn.

Delegita reto

- Kun entute 27 aktivuloj, kiuj en la hungara ĉefurbo plenumas la taskojn en la kadro de la Delegita Reto de UEA, Budapeŝto okupas la unuan lokon en la mondo laŭ la nombro de tiaspecaj funkciuloj.

Flugkompanioj

- Kiel ni jam anoncis en ĉi tiu revuo, Skandinavia Aerlinia Sistemo (SAS) fariĝis la oficiala flugkompanio de la 60a UK en Kopenhago. Al tio ŝuldiĝas la anonco, kiun vi vidis sur la kovrilo de nia decembra numero kaj similaj anoncoj, kiujn vi vidis en la kongresaj eldonaĵoj. Dum la antaŭ-

kongresaj monatoj, SAS letere proponas siajn servojn al ĉiu kongresano aparte. Ankaŭ tiuj leteroj estos en la Internacia Lingvo. Similan interesadon komunikis al ni antaŭ nelonge nia kunlaboranto L. Kordylewski el Krakovo, Pollando: Kiam li en aŭgusto 1974 flugis per la belga kompanio Sabena, partopreninte la Somerajn Universitatajn Kursojn en Lieĝo, s-ro Kordylewski faris iajn rimarkojn pri la lingvoj uzataj de la flugkompanio. Reveninte hejmen, li ricevis leteron kun klarigoj de Sabena. Ankaŭ tiu letero estas skribita en Esperanto.

Vortaroj

- Laŭ *Budapeŝta Informilo*, bone redaktata monata eldonaĵo de la Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA, en aŭgusto ĉi-jare aperis suplemento al la *Sanitaria-ekonomia vortaro*, eldonita de la hungara ministerio pri sanitariaj aferoj. La Suplemento al la plurlingva vortaro enhavas ankaŭ Esperantan tradukon de la terminoj. La Esperanto-fakon kompilis Desz  Is py kaj d-ro Lajos Moln r; reviziis d-ro K. Kalocsay.

Persone



Simeonov

- Ing. Simeon D. Simeonov, iama vicprezidanto de TEJO kaj multjara komitatano de UEA, antaŭ nelonge ricevis novan postenon en grava internacia faka organizaĵo en Ĝenevo, Svislando. S-ro Simeonov planas daŭrigi sian aktivecon en la Movado, utiligante la fakton, ke en Ĝenevo troviĝas la sidejo de multnombraj internaciaj organizaĵoj.

B guin

- En la decembra numero de nia revuo (p. 215) ni menciis koncertojn de la svisa pianistino Danielle B guin en Italio kaj Jugoslavio. La novaĵo tiklis nian scivolon kaj ni klopodis akiri pli da informoj pri la muzikistino. Ni skribis al samnoma sviso tiucele kaj ricevis respondon de lia fratino — Danielle B guin mem. Montriĝis, ke ankaŭ ŝi estas dumviva membro de UEA, tamen sub alia nomo (Ieguier). Sen permeso, ni citas fragmenton el ŝia letero: "Ankaŭ en Sud-Ameriko kaj Usono mi ludis por esperantistoj. Dank'al Esperanto mi malkovris gitarlernejon en Laponio kaj povis ludi en mandolin-orkestro de Ĉikago. Sed, mi ne volas ĝeni vin rakontante ĉiujn vagabondajn aventurojn de pianistino, kiu fakte estas (aŭ estis) pli vagulino ol pianistino." Nu, interese! Ni proponos al la LKK de la 60a UK, ke ĝi klopodu persvadi Danielle alvagi en Kopenhagon, fine de julio ĉi-jare.



Haudebine

- S-ino Madeleine Haudebine, post Cseh mem kaj Morariu unu el la plej konataj kaj plej persistaj Cseh-instruistoj de Esperanto, komence de ĉi tiu jaro revenos al sia hejmlando Francio, post 15 jaroj pasigitaj en Hinda Unio. S-ino Haudebine iris al Hinda Unio en la jaro 1958 por ekde tiam dediĉi ĉiujn siajn fortojn kaj havaĵojn al la progresigo de la Esperanto-movado en Hinda Unio, precipe al la kreo de propra hinda kerno de aktivuloj. Pri la spertoj kaj sukcesoj de s-ino Haudebine ni klopodos amplekse raporti en unu el niaj baldaŭaj numeroj.



Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1973, Dua Parto, p.157. Mallongi-
goj: I = informoj; P = parolado; K = kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200 m (1502 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 31.45 m (9540 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtokesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Varsovio, 41.99 m (7145 kHz), 31.45 m (9540 kHz), 31.01m (9675 kHz). I.P.
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48,90 m (6135 kHz). I.P.

Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 41.38m (7250 kHz), 13.83 m (21705 kHz). I.P. Radio Wien, Esperanto-elsendo, Argentinierstr. 30a, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
08.30-08.55 Sofio, 49.42 m (6070 kHz). P. Radio Sofia, Bulgario.
10.30-11.00 Muritiba, 190m (1580 kHz). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
11.00-11.30 Pekino, 47 m, 40m, 30m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinio.
12.30-13.00 Pekino, 30m, 25m, 19 m. I.
20.00-20.20 Romo, 50.08 m (5990 kHz), 41.24m (7275 kHz), 30.90 m (9710 kHz). P. Radio Roma, Esperanto-fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.
20.05-20.30 Sofio, 50.61 m (5928 kHz). P.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.
12.20-12.30 Berno, 75.28 m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 19.60m (15305 kHz), 19.44m (15430 kHz), 16,86m (17795 kHz), 13.94m (21520 kHz). P. (d-ro A. Baur). Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

Marde

12.10-12.20 Gdańsk, 66.29 MHz (mod. frekv.). Ripeto, dek tagojn poste, de la sabata programo el Varsovio unu fojon en la monato.
16.40-16.55 Bratislavo, 68.84 MHz, (mod. frekv.) kaj aliaj stacioj 67.94 MHz, 69.20 MHz, 69.50 MHz, 69.68 MHz. K. Radio Bratislava, Leninplaco 13a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakio.

Merkrede

12.20-12.30 Berno, kiel lunde (s-ro Gacond).
12.30-12.45 Vieno, 203 m (1475 kHz). P. (ĉiun kvaran sinsekvan merkredon).
20.45-21.00 Sabadell, 203 m (1475 kHz), 89.1 MHz (mod. frekv.). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

Ĵaŭde

16.25-16.40 Bratislavo, kiel marde.
21.45-21.55 Berno, 75.28 m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46 m (9535 kHz), 25,60m (11720 kHz), 25.27m (11870 kHz), 19.60m (15305 kHz), 19.44m (15430 kHz). P. (d-ro Baur).

Vendrede

20.00-20.30 Pekino, 43 m, 33 m, 31m, 25m. I.
23.05-23.20 Zagrebo, 264 m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Jugoslavio.

Sabate

00.10-00.20 Varsovio, 1321 m (227 kHz). P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando; ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo.
11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
16.45-16.55 Vieno, 48.74 m (6155 kHz), 16.87 m (17780 kHz). I.P.
20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.
21.45-21.55 Berno, kiel ĵaŭde (s-ro Gacond).

22.00-22.15 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanio.

SVISA RADIO. La Esperanto-fako ekzistas jam de 1946. Tiam la programo daŭris kvin minutojn unufoje en la semajno. Dum la Universala Kongreso de 1947 en Bern okazis ĉiutagaj elsendoj. La nombro de la elsendoj kaj ilia daŭro kreskis iom post iom ĝis la nuna stato: lunde kaj merkrede je 12.20 GMT, ĵaŭde kaj sabate je 22.45 GMT; ondlongoj estas indikitaj en la tabelo aperinta sur la paĝo 180 de la oktobra revuo. La redaktoroj de la programoj, d-ro Arthur Baur kaj s-ro Claude Gacond, estus dankaj, se aŭskultantoj skribus al ili alportante siajn opiniojn pri iliaj paroladoj kaj sugestojn por pritraktotaj temoj. Korespondadojn adresu al: Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15.

BRAZILO. *Rádio Clube de Sorocaba* daŭre dissendas de la jaro 1965 ĉiusemajnan programon antaŭe dum 30 minutoj, nun dum 60 minutoj. La ondoj estas kapteblaj je distanco de pli malpli 100 kilometroj, en areo loĝata de pli ol 200 000 homoj kun dekoj da lernejoj kaj universitato. La radio-programo estas grava helpo al diskonigo de Esperanto per prelegoj kaj loka gazeto. Respondeas pri la programo s-ro Manoel Blaz Garcia. La dissendo okazas ĉiun lundon de 00.00 ĝis 01.00 nun per la sola ondo 278m (1080 kHz); adreso: Rádio Clube de Sorocaba, Rua São Bento 190, BR 18100 Sorocaba, SP, Brazilo.

RADIO VARSOVIO krom la ĉi-supre anoncita ĉiutaga programo prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de 21.00h ĝis 21.30h per ondoj 49 m, 41 m, 31 m; 2) dum la svedlingva programo marde de 15.00h ĝis 15.30h per ondoj 200 m, 49 m; 3) dum la danlingva programo dimanĉe de 20.00h ĝis 20.30h per ondoj 49 m, 41 m.

N-ro 485, 1974-11-30

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

NED: K. Rosier. SVISL: Hans W. Grossmann.

SOCIETO ZAMENHOF 1975

USONO: 4 Ken Thomson. SVED: 5 Paul Almén; 6 Arved Johansson; 7 Henrik Karlsson; 8 Dagny Lundgren; 9 Gurli Nylin; 10 Gösta Persson; 11 Folke Pettersson.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1975-03-15 neniu membro pro grava kaŭzo protestos la nomigo fariĝos valida.

AŬSTRAL: John Moore, D Emu Park; Joyce Turner, D; Desley Davies, VD; Yvonne Rayner, FD Rockhampton. BELG: R. Demarche, FD Verviers. BRIT: H. Chapman, D kaj FD Barwell; G. Leon-Smith, D kaj FD Egham; Albert Goodheir, D Glasgow; L. Dore, D Guildford; Mary Davies, D kaj FD Morecambe; H. Fillingham, D Nottingham; G. Leon-Smith, D kaj FD West Drayton. DANL: Edith Jensen, FD København. FINNL: P. Kilkku, FD Säkylä; P. Kivioja, D Rovaniemi. FRANC: Henri Rousseau, D kaj FD Caen; J. Dettwiller, FD Echirolles. FRG: G. Schmitt-Möckel, JD Bochum. HUNG: B. Mihályi, D kaj FD Bóly; J. Herjeczki, D kaj FD Gyula; György Adorján, FD Pécs. PORT: M.M. Gouveia, D Funchal, António Lopes, FD Lisboa.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en Jarlibro 1974, Unua Parto:

AŬSTRAL: Rockhampton, D, FD (PTT) kaj FD (SOS-aŭtoservo). BRIT: London, FD (juro); Glasgow, VD; Nottingham, D kaj FD (scienco); Wandsworth, FD (kooperativismo). BULG: Sofia, JD; Karlovo, JD. DANL: Vejle, FD (virinaj aferoj). FINNL: Kirkkonummi. FRANC: Clamart; Saint-Cloud. FRG: Bergneustadt; Günne/Möhnesee; Hamm; Hattingen; Mülheim;

Möhnesee-Günne; Solingen, FD (fervojoj) kaj (filatelo); Wiesbaden, JD. JUG: Zagreb, FD (medicino). JD. HUNG: Gyula. JUG: Zagreb, FD (medicino). NOV-ZEL: Vic-ĉefdelegito. NED: Dordrecht. SVED: Malmö, FD (inĝenierado). US: Palo Alto, D; San Diego, VD kaj FD (militistaj aferoj); Saugus; Wahiawa, FD (turismo).

DONACOJ 1974 (Gld.)

ASOCIA KAPITALO: Kanado: F-ino M.C. Salt 2 595,—. Sumo ĝisnuna 7 392,33.

FONDAĴO CANUTO: Nederlando: E. Burg 2,50; W.A. Verloren van Themaat 25,34. Svedio: Erik Carlén 100,—. Sumo ĝisnuna 2 658,88.

ĜENERALA KASO: FR Germanio: Kurt Schönrich 100,—. Nederlando: J. Smith 45,—; Th.M. Janssen 25,—. Sumo ĝisnuna 4 466,39.

DONACOJ por CED 1974 (en britaj pundoj)

Nederlando: E. Burg 0,40. Svisa Esperanto-Societo 32,40. Sumo ĝisnuna £357,73.

JARLIBRO 1974, DUA PARTO

La Jarlibro 1974, Dua Parto, estas jam delonge presita, sed novajn prokrastojn kaŭzis la bindejo, kiu samtempe devis okupiĝi pri la nova verko *Esperanto en Perspektivo*. Tamen, en la CO oni atendas la

liveron de la Jarlibro fine de decembro, tiel ke oni sukcesos ekspedi ĝin antaŭ la 1-a de januaro kiam denove altiĝos la tarifoj ĉe la poŝto en Belgio. Kiel jam anoncote, en la jaro 1975 la du partoj de la Jarlibro kunfandiĝos en unu volumon. Oni jam fotografas ĝin kaj, se ne okazos ia eksterordinara prokrasto ĉe la presejo aŭ bindejo, la aperon de la Jarlibro 1975 oni povas atendi plej malfrue en la unua semajno de la monato aprilo.

EVITU PAGI PERE DE BANKO!

Kiel ni jam plurfoje anoncis, la bankkostoj en Nederlando nun estas **minimуме 5 guldenoj** por ĉiu unuopa pago el eksterlando, iel tra banko farita. Por ŝpari monon al vi kaj UEA, prefere sendu viajn pagojn pere de la internacia poŝta ĝirsistemo aŭ, se tia ebleco ne ekzistas, pere de internacia poŝtmandato. Niaj membroj en Britio, Francio, Svislando kaj Svedio povas uzi UEA-kontojn en tiuj landoj (v. la Jarlibron). Se vi tamen devas uzi la bankajn pagvojojn, evitu tiamanieran sendon de malgrandaj sumoj, ĉar la bankkostoj por ĉeko de 10 aŭ 100 dolaroj estas egalaj — po 5 guldenoj. Se vi deziras ofte mendi ekz. librojn, pagi abonojn k.s. pere de UEA, estas konsilinde starigi en la Centra Oficejo konton je via nomo per unufoja sendo de iom granda monsumo.

Vi povas helpi la laboron de UEA

pagante akurate vian membrokotizon de UEA por la jaro 1975. Kotizojn oni prefere ĉiam sendu al la koncerna landa kotizperanto (vidu la adresojn en la Jarlibro), ĉar ankaŭ tio simpligas la laboron de la Centra Oficejo. Se en iu lando ne ekzistas peranto, oni bonvolu pagi rekte al Rotterdam. Kotiztabelo por la jaro 1975 aperis en la oktobra numero de ĉi tiu revuo.

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,60 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Kuraĝigu novan grupon en elementa lernejo sendante amase bk al: Esperanto-Klubo, Ecole Communale Mixte, 1 rue du Téléphone, B-5620 Saint-Gerard, Belgio.

Irlandaj mezlernejoj respondos al ĉiuj kartoj, leteretoj, ricevitaĵoj de januaro ĝis junio: Esperanto Circle, St Columb's College, Dublin 14, Irlando.

Instituto Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1 000 gld., ĉu per donac(et)o. La instituto fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financon bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M.H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 IIR, Rotterdam-3002, Nederlando.

Geknaboj ĝojegas ricevi salutojn bildkarte el la tuta mondo! Skribu al: Esperanto-rondeto, Lindnerova Strato, Praha 8 - Libeň, Ĉeĥoslovakio. Anticipe dankas Eli Urbanová, kursgvidantino.

Se vi povas ricevi, petu nian kristanan literaturon. Bedaŭrinde ne malofte okazas konfiskadoj. Eventuala nericevo ne estas nia kulpa. Esperanto-Misio, S-694 02 Hallsberg 2, Svedujo.

Korespondemuloj! Se vi publikigas korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian foton. Ĉiumonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por senpaga aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton kaj afranki ĝin filatele, kio multe helpas al UEA finance. Dankon!

EŬROPA DOKUMENTARO

Post nia artikolo en la oktobra numero (p.166), ni ricevis informon, ke la abono al *Eŭropa Dokumentaro* por 1975 kostos ne plu 9, sed 13 sv. fr. Ĉar krome la svisa franko lastatempe plivaloriĝis, la prezo ĉe la Libroservo de UEA fariĝas 13 gld. (por Nederlando 13,52 gld.). La prezo por la numeroj de 1974 ne estas ŝanĝita.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo), turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso K.S.M., 12 Rue des Jacobins, F-63000 Clermont-FD, Francio, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Āmosevej 5 A, DK-2700 Kopenhavn, daŭre akceptas ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

HELSINGØR 1975

tuj antaŭ UK de Kopenhago

La internaciaj feriaj Esperanto-Kursoj okazos 20.-26. de julio en la Internacia Altlernejo de Helsingør. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ la kongreso de Kopenhago.

Programo senpage havebla ĉe Eva Langkilde, Ingemannsvej 18, DK-3000 Helsingør, Danlando.

Por la Semajno de Internacia Amikeco

de la 17a ĝis la 23a de februaro 1975

uzu la fotopoŝtkartojn "Amikeco trans limoj". Po 2,50 (por Nederlando 2,90) gld. por 10 ekz., + sendokostoj 10%.



LA TORNISTRO

BONA DISTRO - 1975

N° 3



Jam aperis N° 3 kun tre varia enhavo ilustrita. Ankaŭ aĉeteblas N° 1 kaj N° 2. 52 paĝoj, 22 cm. Prezo: po 5 gld. Mendu ilin ĉe UEA, kaj ankaŭ la jenajn verkojn eldonitajn de Argentina Esperanto-Instituto:

LA KRIMO DE L' MILITO, 212p. 15cm. Prezo: 9 gld. **KALEJDOSKOPA VARIETEO**, prozo kaj poezio de Ergoto, 160p. 17cm. Prezo: 9 gld. **JUNULEJO** (Rememoroj de gimnaziano) kaj **LA BUĈEJO**, 128p. 17cm. Prezo: 9,54 gld. **NIAJ PLEJ GRANDAJ VERKISTOJ** (de Eo), **EKFLORADO ĈE PLATA RIVERO** (pri la Eo-movado), 112p. 17cm. Prezo: 7,50 gld. **LAŬTEMA VORTARO** (Esperanto-angla-franca-hispana), 234p. Prezo: 10,20 gld. **BONHUMORA INJEKTILO** (120 amuzaj anekdotoj kaj spritaj dialogoj) de Ergoto de Bonaero, 192p. 17cm. Prezo: 12,75 gld. **LA FRIPONETO DE TORMES** (pikareska novelo), 72p. 17cm. Prezo: 6,36 gld.



La libro, kiu valoras la investon

En mondo de nestabilaj valoroj, kie kvalito estas oferata al kvanto, maloftaj estas la aĉetaĵoj, kies valoro kreskas de jaro al jaro kaj kies apero videble ŝuldiĝas al grandega homa fortostreĉo. Sed tia estas la verko "Esperanto en Perspektivo": monumenta kompendio de la Esperantaj movado kaj kulturo tra 87-jara ekzistado — kaj, perspektive, en la estontecon. Sur ĝiaj 876 paĝoj troviĝas praktike ĉiuj scioj, kiujn povas bezoni la uzanto de la Internacia Lingvo, inkluzive de multaj faktoj neniam antaŭe publikigitaj.

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libroservo de UEA.

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO
De 54 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 18 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- Duobla Kongresa numero
- Libera Tribuno de la legantoj
- Literatura kaj scienca suplementoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

Jarabono: 370 belgaj frankoj aŭ egalvaloro.

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: **13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1**

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska



Unu el la plej grandaj industriaj bazoj de Hungario kaj Mez-Eŭropo estas CSEPEL VAS- ÉS FÉMMŰVEK (Fer- kaj Metaluzinoj Csepel), kiu jene sin prezentas al Vi. La fabrikego, havanta kombinitan karakteron, okupas 34 mil homojn. Inter tiuj pluraj miloj havas universitatan aŭ altlernejan diplomon, altan specialan kvalifikon, kaj multaj el inter ili diversajn sciencajn gradojn.

Al Uzinoj Csepel apartenas 14 produktaj kaj liveraj entreprenoj, esplora, planada kaj kalkulteknika institutoj, krome du internaciaj komercaj entreprenoj.

Ĝiaj produktaj entreprenoj fabrikas vastan skalon da fer- kaj buntmetalurgiaj, maŝin- kaj veturil-industriaj, komunikilteknikaj kaj alttensiaj fabrikaĵoj.

Inter tiujn apartenas la diversaj beton- kaj form-ŝtaloj, forĝitaj kaj prem-formitaj produktaĵoj, per elektro velditaj, varme tub-laminatitaj kaj malvarme vastigitaj tuboj por gaso, akvo kaj oleominado, — ŝtalbotelegoj por konservado de diversaj gasoj, — fer- kaj ŝtal-muldaĵoj pretigitaj en malgrandaj kaj grandaj serioj, formoj pretigitaj per kontinua muldprocezo.

Inter la buntmetalurgiaj produktaĵoj troviĝas tuboj, stangoj, bendoj, — alojoj de bazo kupra, nikela kaj fera, — termodilataj materialoj, magnetaj materialoj, veld-elektrodoj, per kokilo formitaj gisaĵoj, metalbazaj kemiaĵoj.

Krom la fer- kaj buntmetalurgiaj produktaĵoj la entreprenoj de la Uzinoj Csepel fabrikas ilmaŝinojn tradiciajn kaj NC-komanditajn, tutmonde rekonitajn, — maŝinojn de konfekcia industrio, hidraŭlikajn pneŭmatik-vulkanizajn premilojn, tublongigajn kaj ebenigajn kaj pintigajn maŝinojn, drat-pretigilojn, aŭtomatajn vakuo-impregnajn instalaĵojn, transformatorojn kaj instalaĵojn por garaĝoj.

La fabrikaĵoj estas eksportataj per 10-11 entreprenoj de internacia komerco al ĉirkaŭ 75 landoj.

Informado:

**Csepel
Vas- és
Fémművek
Értékesítési
Főosztály**

H-1751 Csepel 1. Pf. 93